Sekr. de E.C.

Verviers.

COMOTO, la nova spirita movado.
Comoto fremdlandan-propaganda
oficejo, Aĵobe, Japanujo.

b) REVUOJ.

Arboider-Esperantisten (La La-
borista-Esperantisto)-Folkets
Hus, Oslo, Norvegujo.

Brazila Esperantisto.-Praca
15 de Novembro, IOI, Rio de
Janeiro.-Brzilujo.

Hungara Esperantisto.-Vaosi-u-
tea, 8.I.12., Budapest IV.,
Hungarujo.

International Language.Hart
Street, 17, London, W.3. 1,
Anglujo.

Litova Stelo.-Retuŝes aikŝtė,
6, Kaunas, Litovujo.

La Semisto.-Mendizabal, 3, Sa-
badell, Hispanujo.

La Unuigita Entomarc.-W. Hey-
born, Hamburg, 15, Germanujo.

Työmiehen Vuokalehti.Kotkankatu,
Helsinki, Finlando.

LOKAJ INFORMOJ, KUNVENOJ.

A.P.P.K. Jaude, je la 8a, en la
sidejo, Van Wezenbkestraat, IO.
Diversaj fremdlandaj revuoj est-
as je la dispone de la vizit-
antoj. Ĉiu estas bonvena.

Komence de la 5a de majo
la kunvenoj de A.P.P.K. okaz-
os ĉiumarde.

A.G.E.D. -La Ian mardon de la
monato, je la 8a, en la sidejo
Plantijnlei, 66 - 68.

A.P.G.E. -En la Poliernejo,
Gildenkamerstraat, 9.

SUDA LUMO. - Vidu A.P.P.K.

A.G.W. - Vidu A.P.P.K.

NIA IDEO. - Ĉiun merkredon, je
la 8a, en Volksgebouw, Meir.

MIKSKURSO al Bergen - op - Zoom,
kan akcepto de la tiaj gesam-
ideanoj, okazos dimanĉon 24an
de majo.

Pliaj detaloj pri arango kaj
prezo aperos en la venonta
bulteno. Ankaŭ ne-esperant-
istoj povas partopreni.-
Provizorajn aliĝojn oni tuj
sendi al Sro J. Swalf, Au-
gust Sniedersstraat, 51,

Keikaj samideanoj, bic-
iklistoj, decidis parto-
preni bicikle en la ekskurso.
La distanco de Antwerpen
(Centra Stacidomo) al Ber-
gen-op-Zoom estas 35 KM. Oni
veturas malrapide.

La antwerpenaj diamant-
istoj decidis sendi oficialan
delegiton al la XVIIa kaj ek-
lektis por ĉiu misio nian sek-
retarion, SronA. Posener.

Nia simpatia samideano
Sro Jef De Waegenaere estis
grave operaciita en Genta
kliniko, la 10 en la luna
monato. La operacio bone sukce-
dis. Ni sincere esperas ke li
estu baldaŭ tute resanĝinta
kaj ke ni havu la honoron aus-
kulti liajn valorajn konsilejojn
kaj la gojon ĝui lian ĉiaman
bonhumoron.

Nia AGO (Hoboken) anoncas nov-
an kurson, kiu komencas mar-
on, la 5an de majo. La kurso
okazos dufoje en la semajno,
mardon kaj vendredon, je la
7 1/2 vespere, en la lokan-
uma lernejo de la Kapelstrato
Hoboken.

NIA AGO invitas ĉiajn gesam-
ideanojn ĉeesti la intiman es-
perantistan feston, kiun ili
organizos en kunlaborado kun
NIA IDEO (Antwerpen), sabato,
la 5an de aprilo, je la 7 1/2
en la Casino, Kapelstrato,
Hoboken.

ELIĜOJ DE A.P.P.K.

MIGRANTAJ KARTOJ.-Uzu la plej
pratikajn migrantajn kartojn.
COUES PRATIQUE d'ESPERANTO
1922, paĝoj. 6 fr. fr.
Monaci de la administracio:
August Sniedersstraat, 51.

BULTENO

MONATA ELDONO
DE LA

ANTVERPENĀ PROPAGANDA
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSSTRAAT 51

Ia Jaro

No 6

Junio 1925.

Jara abono Belgujo: 2,5 bfr.
Unu numero 0,25bfr.

Eksterlando: 4 bfr.
0,40bfr.

SARKMONATO.

Estis varme!

Varmega tago. Unu el la maloftaj, kiujn la printempo ŝatisdonaci al ni. La tutan tagon mi suferis pro varmo, kaj finiĝinte mian tagan laboron mi rapidis forlasi la urbon, por senti la refreŝigan aeron kampan. Mi ne estis sola; multaj agis tiel, kaj ŝajnis al mi, ke tairante la urbordegon, tiuj homoj kun portis la urban varmon.

Nenia venteto blovis.

Blankvojetoj, nerimarkata de la preterpasantoj, alovis min laŭ la ĝia, pronasante per sia ombro la tielserĉatan malvarmon.

Pro alloga por kontraŭstati. Ilenpulme mi enspiras la kampodorojn.

Mi ekrevivis. Longtempe mi promenadis, kiam maljuna kamparano, prilaboranta sian kampon, altiris mian atenton. Estis kvazaŭ enanimkaŝita fortego devigis min alparoli lin.

"Kara paĉjo", mi diris, "ankoraŭ laboranta?"

"Jes, amiketo," respondis basvoĉo: "Ĝi estas pli forte ol mi," kaj silentis. Mi ne rigardis lin, kaj ne komprenis. Sed sciante kian fermitan karakteron havas ninoj kamparanoj, mi ankaŭ silentis. La maljunulo daŭradis; mi rigardis. Momentoj jam forflugis, kiam la rigardoj de la kamparano, kiu ovis la laboron por ekbruligi sian pipeton, renkontis la miajn. Ĉu li instinkte sentis, ke ne nur kuriozo instigis min alparoli lin.

"Estas junio! amiketo," de-
neve aŭdigis la basvoĉo.

Ĉiam mistero por mi, kiu
ne komprenis.

"Sarkmonato, nekomprenan-
taurbano", iom irone ree parol-
is la kamparano. Nun lumigis
en mia cerbo. Nun mi sciis kial
la maljunulo estis laboranta
ankoraŭ. Sarki, eltiri la lol-
on li devis, por ke la bonaj
kreskaĵoj havi lokon, por ke
lia kampo ne estu tute veneni-
ta per la malbonherboj! Sed la
maljunulo sola, la maljunaj
brakoj malfortaj, ne plu sukce-
sis elradikigi la ĉie super-
flue kreskantan lolon.

"Ĝi estas pli forta ol li."
Nun mi komprenis... bonvesper-
diris al li, kaj daŭrigis mian
promenadon.

Idilia loketo sub densa
foliarkaĵo invitis min al ri-
pozo. Ne eble estis kontraŭ-
stari, kaj agrable mi kuŝiĝis
sur la mola verda herbo. Lon-
gan tempon mi ripozis.

Ekkrepuskiĝis silentiĝis
pli kaj pli. Ankaŭ en mia ani-
mo la milda vespera kvieto
sentigis sin. Sola kun miaj id-
eoj, mi meditis pri la ĵusa
travivitaĵo, kiam akra voĉo aŭ-
digis: "Ankaŭ ĉe ni!" Mi vek-
iĝis el mia revado, rigardis
ĉirkaŭen, nenium rimarkis. Ree
mi kuŝiĝis kaj preskaŭ ekdor-
metis, kiam denove sed pli
proksime la akra voĉo aŭdigis:
"Ankaŭ ĉe ni!" Mi eksaltis,
streĉis mian brakon kaj kap-
tis.... mian propran ideon!

Nedivideblan momenton mi
staris senmove, sed tuj hel-
iĝis en mia kapo.

Dum mia duondormeto la
kampo de la maljunulo metamor-
foziĝis en nia esperanta la-
borkampo. Dum mia revado mi vi-
dis nian unuan semanton. Bon-
kore li semadis ĉien. Jam mal-
juna semanto, li baldaŭ for-
iris de ni kaj lasis la kam-
pon al siaj spiritheredantoj.
Tiuj, ankaŭ bonaj semantoj, se-
mis, semadis, sed ne atentis la
plensemitan kampon. Tial la

lolo kreskis preskaŭ tiel a-
bunde, kiel la bona, kreskaj-
oj, malhelpante fekundan kres-
kadon!

Sed tiuj neatentaj se-
mantoj malaperis; aliaj post-
eĉloj venis. Nun... pli, junaj,
pli fortaj brakoj prilaboris
la kampon. Ili ankaŭ semis,
semadis, sed unuigis por gar-
di la kreskaĵon kiel sian
okulalumon kaj sarki la kam-
po je ĝusta tempo!

Estas junio, sarkmonat-
o!... diris la maljuna kamp-
arano!

"Ankaŭ ĉe ni!" mi diras
kreskas lolo, multe da lolo.

Ni agu kiel la kampar-
ano. Ni eltiru senkompate la
superfluan lolon, por ke la
da ni nunjare disĵetitaj se-
moj estu fruktodonaj!

A. Posener.

ANTVERPENO!

la urbo de miaj revoj.

Laŭ: Wien, du Stadt meiner
Träume.

El fremdregion',
Hazarda dispon'
Kondukis min al Antverpen'.
La mondparadiz'
La norda Pariz'
De taga kaj nokta festen'.
Nenia dolor'
Jen restas en kor',
Pro ĝojo tremanta, de l'hom
Certigu do vin,
Vi, knab kaj knabin',
De l'indo de tia renom'.
Amuzoj, plezuroj vokas al ĝi
Vi ĝuos tie ĉiam pli!
Vi, fama Skeldhaven',
Estas sur tere por mi l'Eden'
Urbo grandega, viv' juvel',
Restas en revoj la nura cel'!
Ni ĝoju el la kor';
Estas plej gaja en mond'
"Sinjor!"
Vivu, vi Flandro kaj via
popol'!
Anim' de l' Metropol'!

H. Mulder.

LA SONORILARKONCERTOJ EN ANTWERPEN.

Oni fiksis la programon de la sonorilarkoncertoj de junio ĝis septembro jermaniere: **ORDINARAJ KONCERTOJ** je lundoj, de la 9a ĝis la 10a vespere, 16, 22 kaj 29 junio; 6, 13, 27 julio; 3, 10, 17, 24, 31 aŭgusto; 7, 14 septembro, de sinjoro Gust. Brees, urba sonorilaristo.

EKSTERORDINARAJ KONCERTOJ DE la 9a ĝis la 10a vespere. Jaudon, 18 junio, de la lernantoj el la sonorilarlernejo de Mechelen.

Jaudon, 2 julio, sinjoro G. Brees urba sonorilaristo.

Jaudon, : julio, la lernantoj el la sonorilarlernejo de Mechelen.

Vendredon, 10 julio, de sinjoro G. Brees, urba sonorilaristo (Festoj de la Oraĵ Spronoj. Lundo, 20 julio, sinjoro Gust. Brees, urba sonorilaristo, (Nacia Festo).

Jaudojn, 23 julio, 13 kaj 27 aŭgusto, sinj. Gust. Brees.

Jaudon, 3 septembro, la lernantoj el la sonorilarlernejo, Mechelen.

Jaudon, 10 septembro, sinjoro G. Brees.

Jaudon, 17 septembro, sinjoro Ant. Nauwelaerts, urba sonorilaristo el Brugge.

La detalaj programoj aperos en la lokaj ĵurnaloj.

La vizitantoj al Antwerpen neniam forgesu aŭdi tiujn-ĉi famajn koncertojn.

A.P.P.K. volonte donas pliajn informojn kaj akompanos vizitantojn al plej bona loko por aŭdi la koncertojn. Por informoj sin turni al la sekretario de A.P.P.K. Sro J. Cats. Stierstraat, 2 Antwerpen.

Oni petas represon en esperantaj kaj naciaj gazetoj.

to la unuan datrevenon de sia fondo. La festo okazis en la ĉambrego de la "Casino" Kappelstraat, Hoboken. Ĝi havis precipe propagandan celon kaj laŭ tiu vidpunkto ĝi bonege sukcesis, ĉar multaj neesperantistoj ĉeestis.

La prezidanto de "Reis en Studiekring" malfermis la feston per mallonga parolado en kiu li klarigis kial oni fondis la esperantistan grupon.

Sro Van Sitteren klarigis al la ĉeestantoj ke kvankam la rezultato de la unua ĵar estas malgranda, oni povas rigardi tion, kiel grandan sukceson. Li certigis ke la venonta ĵaro estos pli fruktodona.

Poste komencis la amuza parto de la festo. La programo estis tre lerte kunmetita. Piano, mandolinoj, solkantado, ĥorkantado, deklamado alternis. Ni ne deziras ofendi la modestecon de la kunlaborantoj publikigante iliajn nomojn. Ni nur diru ke ĉiuj, senescepte, plene meritis la laŭdajn aplaŭdojn.

Inter la unua kaj la dua partoj de la programo Sro Jacobs, prezidanto de A.P.P.K. parolis pri la granda valoro de Esperanto por la labristoj kaj faris alvokon por ke ĉiuj ĉeestantoj ĉeestu la kurson, kiu komenciĝos la 5an de majo en komunuma lernejo de Hoboken.

VIZITO AL MUZEOJ.

A.P.P.K. organizas por siaj geanoj kaj geamikoj vizitojn al la jenaj muzeoj el la urbo:

La 1an de junio: Vizito al la Muzeo de Pelaj Artoj. Sinjoro Cornette, konservisto de la Muzeo bonvolas akcepti kaj rondgvidi nin en la muzeo. Konveno je la 10a ĉe la enirejo de la muzeo.

La 21an de junio: Vizito al la Muzeo Plantijn. Ni estos akceptataj de la direktoro post la deko,

NIA AGO.

La 26an de aprilo, "Nia Ago" festis en familia kunco-

Sinjoro Sabbe estos malhelpata rondgvidi nin, sed li zorgos havigi al ni alian kompetentulon.

Kunveno je la 10a ĉe la enirejo de la muzeo.

RICEVITAJ.

ARBAIDER-ESPERANTISTEN.-La laborista Esperantisto.-Oslo, Norvegujo.

ARBETAR-ESPERANTISTEN.-La laborista Esperantisto.-Göteborg, Svedujo.

BRAZILA ESPERANTISTO.-Rio de Janeiro, Brazilujo.

HOLANDA ESPERANTISTO.-Eemnes, Nederlando.

HUNGARA ESPERANTISTO.-Budapest, Hungarujo.

INTERNATIONAL LANGUAGE.-London, Anglujo.

LIBERPENSULO.-Leipzig-Neustadt, Germanujo.

LITOVA STELO.-Kaunas, Litovujo.

LA SEMISTO.-Sabadell, Hispanujo.

TYOMIEHEN VIIKKOLEHTI.-Helsinki, Finlando.

LA UNUIGITA TUTHOMARO.-Hamburg, Germanujo.

VEGETARANO.-Hamburg, Germanujo.

INFORMOJ.

NIA IDEO.- La 20an de junio, je la 8a vespere, festo en la etaĝaj salonoj de Volksgebouw, Meir, Antwerpen. Ĉiuj esperantistoj estas invitataj.

MENLENA GRUPO ESPERANTISTA, intertenas organizi de la 19a ĝis 21a de julio tendaron en Rijmenam. La sekretario, Stattiestraat, 16, Mechelen, plezure sendos pliajn informojn al la petontoj.

La lernantoj de la loka sonorilarlernejo de Mechelen ludos en sia urbo la 9an de aŭgusto, 27an de septembro, 21an de novembro kaj 2an de decembro. Plie majstro Sro Jai Denijn ludos la 1an de julio de la 9a ĝis la 10a matene.

NIA AGO. (Hoboken) - La 5an de

maĝkomenciĝis kurso pri Esperanto, kiun gvidas Sinjoro Piet Van Sitteren. La Komunumo metis je la dispono klasĉambron en la komunuma lernejo de la Lambrechtstrato, 45 personoj ĉeestis la unuan lecionon. Oni esperas baldaŭ varbi profesion instruiston kiu okupos sin pri la instruado de Esperanto en la komunumo Hoboken.

A.P.P.K. sciigas kun ĝojo la resaniĝon de Sro Jai de Waegenaere kaj de Sro J. Posener, nia ĝenerala sekretario. Ambaŭ ĉeestas de nun regule la kunvenojn kaj fervore helpas nian laboradon.

OFICIALAJ KURSOJ.- La oficialaj kursoj finiĝis la 26an de aprilo. Ĉiuj lernantoj sukcesis en la ekzameno kaj ricevis de la urbo oficialan ateston, kiu ratigas ilin ĉeesti dum la venonta vintro la superankurson pri Esperanto. Ni sincere gratulas ambaŭ profesorojn kaj ankaŭ la lernantojn pro la bela sukceso.

VERDA LUMO.-Tiu-ĉi grupo faris ekskurson per biciklo al Kessel, dimanĉon, la 3an de majo. En la ekskurso, kiu bonege sukcesis, ne nur partoprenis ganoj de la organizanta grupo sed ankaŭ gesamideanoj el Lier, Mechelen kaj Sint-Niklaas.

NOVA LERNLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernolibron ilustritan: "COURS PRATIQUE D'ESPERANTO", eldonita de Librairie centrale espérantiste, Paris.- 192 paĝoj-Prezo: 6,50fr.

Ĝenerala deponejo por Belgujo: A.P.P.K. 91, Rotterdamsestr. Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

MIGRANTAJ KARTOJ.-A.P.P.K. Uzu la plej praktikajn migrantkartojn.-Antaŭmilita prezo: 10 por 1 fr.

BULTENO

MONATA ELDONO
DE LA

ANTVERPENAJ ESPERANTO
PROPAGANDA KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 TRAAAT 51

1^a JARO

JULIO 1925

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo: 2,50 Bfl.
" 0,25 Bfl.

Eksterlando: 4. — Bfl.
" 0,40 Bfl.

NIA GVIDSTELO.

Tra densa mallumo briletas
la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.

L. ZAMENHOF (*La Vojo*).

Jam, antaŭ multaj jaroj, naskiĝis infaneto.

Ne en staletoj, kiel la etulo Jesuo, sed tamen ĉe malriĉuloj. La gepatroj, feliĉaj en sia simpleco, feliĉaj je rigardado de sia unuulo, jam kuraĝis antaŭdiri la sortodestinon por sia etulo. Tio ne plaĉis al la riĉaj familianoj, kiuj konsideris tion tro altcela por tia infano. Tia idealo nur estas por riĉaj infanoj, do por siaj postuloj. Furioze ili forlasis la domon kaj detenis la ĝis nun donitan helpon. Pro tio la (nov)naskituleto ne havas baptopatron kaj la malriĉaj gepatroj restis solaj por eduki sian karuleton, por gvidi ĝin sur la malebena vojo de la vivo kondukanta al la vivocelo!

La 22^a de julio 1924^a tia infaneto ankaŭ naskiĝis en nia urbo.

La A. P. P. K.

Hodiaŭ, mi prezentas ĝin al vi fiel bonfarta ol iam, en festvestaĵo okaze ĝia unua datreveno!

Tamen, se vi vidos nian etulon, vivema kaj ardenta je saneco, ne imagu, ke ĝi grandiĝis tiel facile. Kiel ĉiuj infanoj, laŭ leĝoj naturaj, ĝi ankaŭ suferis pro la infanmalsanoj. Sed per la bonaj, amdonaj gepatraj zorgoj, ĝi tiel fortiĝis por kontraŭstari tiujn infektigajn malsanojn.

Jen en kelkaj vortoj la historio de la A. P. P. K., kies geanoj jam pretigas sin, por festi tutkore la aivenon je la unua mejloŝtono de ĝia ekzistado.

Kiu atendas nin tie? Ĉu la Zamenhofa familio, kiu ĉeestis nian naskiĝon, forlasis nin, kiel en la rakonto, ĉu ĝi memoras ankoraŭ la infaneton? Kiel ĝojiga estu, se nia tuta familio ĉeestus, tiun naskiĝtagon, se la 22^a de nuna monato estus samtempe repaciĝtago!

Tamen mi dubas..., ĉar ili ŝajnas vivi tiel malproksime.

* * *

Unu jaro forflugis en sollaborado. Nur malgranda parto de nia fincelo efektiviĝis. Alveninte je la unua mejloŝtono, ni fiere povas rerigardi la jam laŭiritan vojon! Sed la vojo pli kaj pli malebeniĝas.

Ni ne timu! Nia gvidstelo ĉiam brilas antaŭ ni.

Ni sekvu ĝin kaj rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan!

A. Posener.

Nia Skabeno pri publika Instruado.

S^{ro} K. Huysmans, kiu estas tre fervora al nia movado kaj kiu enkondukis Esperanton en la oficialajn vesperkursojn estas vokita al la alta posteno de Ministro pri Sciencaj kaj Belaj Artoj. La A. P. P. K. gratulas lin, esprimante la deziron, ke li baldaŭ enkondukos ĝin en ĉiujn gradojn de la Publika Instruado.

* * *

Ekskurso al Bergen-op-Zoom

Pro manko da loko, la raporto pri la ekskurso al Bergen-op-Zoom ne aperis en la lasta bulteno. Ke niaj abonantoj bonvole senkulpigu nin.

La 24^{an} de Majo la grupoj aliĝintaj al A. P. P. K. faris ekskurson al Bergen-op-Zoom. Krom ĝiaj membroj ankaŭ kuniris geanoj el Mehleno, el Liero, kaj la Flandrema Grupo Esperantista el Antwerpen.

Frumatene tridek biciklistoj foriris; poste tridekdu samideanoj forveturis aŭtobuse de «Oude Bareel».

Laŭ la opinio de la gajaj kantantoj, ni tro rapide alvenis en Bergen-op-Zoom!

En urba lernejo nin bonvenigis S^{ro} Holleman, delegito de U. E. A.. Knabeto, unu el la gelnantoj de S^{ro} Holleman, tre afable salutis nin esperantlingve. Nia plej juna amiketo, Karel Jacobs, el Antwerpen, dankis per simplaj, koraj vortoj.

Poste, nia sekvantaro marŝadis tra la stratoj, sub malnova, pentrinda pordego, pum la loĝantoj, scivolemaj rigardis la flagojn de la diamantistoj, de «Nia Ideo», de la Flandrema Grupo, kaj la blankajn

flagetojn kun verdaj steloj, kiujn portis la infanoj.

En la urbodomo, la urbestro, S^{ro} Stulemeyer, akceptis nin. Per sentplena parolado, li pruvis ke li tute komprenas la belecon de la interna ideo de nia kara lingvo. Li ankaŭ ĝojis pro la kreskanta simpatio inter Hollando kaj Belgujo, simpatio, kiun stabligos la traktato kiun subskribis la ministroj Van Karnebeeck kaj Heymans. La Hollandaj kaj Belgaj Esperantistoj esprimis sian dankon al S^{ro} Stulemeyer; la juna fraŭlineto Koba Smits transdonis belajn, freŝajn florojn al la S^{ro} urbestro — ne — urbopatro, kiel lin nomis S^{ro} Holleman.

Posttagmeze, ĉiuj gesamideanoj promenas al la proksima arbaro. Nur, la antaŭirantoj eraris, kaj, dum du horoj ni vagadis sur la erikejo. Feliĉe ke la vetero estis bona! La plejmulto el ni eĉ ne sciis ke tiu ekskurso ne estis laŭ la programo! Kiam fine ni alvenis en la arbaron, S^{ro} pastro venis al nia renkonto por bonvenigi nin.

Je la sepa vespere ni forlasis Bergen-op-Zoom, ĝuantaj pri la agrabla tago. Kore ni adiaŭis niajn novajn konatulojn, kaj ĉiuj esprimis la deziron baldaŭ rekunveni, sed nun, en Antverpeno!

* * *

Nia Ideo.

La 27^{an} de Junio «Nia Ideo» organizis koncerton en la etaĝaj salonoj de «VOLKS-GEBOUW». La festo plene sukcesis, kaj multaj gesamideanoj aplaudis la oferemajn kunlaborantojn, kiuj amuzis la ĉeestantojn per kantoj, deklamadoj, per siter-piankaj mandolinludado. Rimarkinda kaj admirinda estis, ke ĉiuj kantoj estis elektitaj el fremda muziko: rusa, pola, finna; ĉar sen Esperanto ni certe neniam estus aŭdintaj la misterplenajn, melodiojn, kiuj ĉarmis nin dum la koncerto.

Por fini kelkaj Niaj Ideanoj reprezentis: «UIT LIEFDE VOOR DE KUNST.» amuzan teatraĵeton. Por respekti la modestecon de la kunlaborantoj, kiuj ĉiuj meritas la plej flatan laŭdon, ni ne mencias iliajn nomojn.

Inter la unua kaj dua partoj S^{ro} Jacobs, prezidanto de A. P. P. K., dankis «Nia Ideo» pro ĝia bela agado. Tiu grupo vigle

propagandas ; ĝi bone progresas ; la sukceso de la festo sufiĉe provas tion.

S^{ro} Jacobs instigis la neesperantistajn ĉeestantojn sekvi la oficialajn vesperkusojn en la urbaj lernejoj, post somerlibertempo.

Li ankoraŭ precipe dankis S^{ro}n Van Sitteren, la fervoran prezidanton de Nia Ideo.

Per sprita parolado S^{ro} Van Sitteren transdonis la dankesprimon de S^{ro} Jacobs al siaj bonaj gekamaradoj, kiuj sukcesigis la feston.

Por la novuloj, S^{ro} Van Sitteren klarigis la kunlaboradon de « Nia Ideo » kun la aliaj Esperantaj grupoj en A. P. P. K., federacio kiu nur celas puran Esperantan propagandon, sendependa de fakaj aŭ politikaj agadoj.

FIANĈIĜO.

Ni havas la plezuron anonci la fianĉiĝon de fraŭlino J. Kin, anino de A. P. P. K., kun sinjoro Droste, esperantisto el Utrecht (Nederlando). Korajn gratulojn.

Festa Ekskurso al Hemixem.

okaze de la 1^a datreveno de la starigo de A. P. P. K., la 21^{an} de Julio 1925.

Forveturo de la urba naĝejo (Zwemdok) per aŭtobuso, je la 2^a posttagmeze tre akurate.

Veturado ĝis « Huis ten Halve » (Boomsche Steenweg — Aartselaar).

Promenado al Hemixem.

Akcepto de la esperantistoj de Hemixem Je la 5^a, festeno en la restoracio « Hotel S^t Bernard ». — Prezo : 6 Fr. (Oni tiel zorge kunmetis la menuon, ke ĝi certe kontentigos la plej postulemajn stomakojn)

Kantado. — Dancado.

Pri la reiro oni decidis laŭ la cirkonstancoj.

La partoprenontoj anoncu sin kiel eble plej baldaŭ ĉe S^{ro} J. Swalf, August Sniedersstraat, 51, kaj certe antaŭ la 18^{an} de Julio, aldonante 6 fr. por la festeno.

Ĉiuj esperantistoj kun iliaj amikoj estas kore bonvenaj !

Iĝu membro de
U. E. A.

Rakontetoj

El „*Golestan*“ : Florejo de Saadi.

Mi vidis arabon, kiu parolis al sia filo :
« Mia filo ! En tago de Reviviĝo oni demandos vin pri viaj agoj, sed ne pri via parenceco. Diris Dio Plejalta : « Kiam oni ekblovos en trumpeto, ne estos tiam diferenco inter homoj ».

Oni kisas la vestaĵon faritan por Kaabo, sed ja ĝi ne estas kudrita el la plej bona silko. Restu iom da tagoj kun la respektinda homo kaj certe vi mem estos estimota kiel li ».

* * *

Ŝaho ordonis ekzekuti senkulpan homon.

Tiu ĉi diris :

— « Ho potenculo ! Ne altiru sur vin la mizregon per la kolero, kiun vi havas pri mi ».

— « Kiamaniere ? » — demandis la Ŝaho.

— « Tiu ĉi ekzekuto plilongigas por mi unu momenton, sed la peko por ĝi restos sur vi je eterne.

Pasas la vivo, kiel la vento matene, Pasas malĝojo kaj gajo, beleco kaj kriplo. Pensu tirano, ke ĉiuj ofendoj faritaj Pasos por ni, sed responda vi estos ».

Tiu ĉi sentenco okazis utila por la Ŝaho ; li foriris la ekzekuton de senkulpon kaj pardonis lin.

* * *

Iu kormercisto malprofitis mil dinarojn kaj diris al sia filo :

— « Ne decas paroli pri tio kun iu ».

— « Ho patro » ! respondis la filo, « Via vorto estas leĝo, sed klarigu min kia estas la profito en via konsilo havi tion sekreta » ?

— « Por ke ne fariĝu du malbonaĵoj », diris la patro, « la unua, la perdo de la kapitalo kaj la alia, la mizerĝojo de la najbaroj. Ne parolu pri via mizero kun malamiko, ĉar en la ĝojo li diros : « Dank' al Dio » !

* * *

Unu el la veziroj iris al la egipta ŝejho Zunun kaj volis de li la konsenton.

— « Tagon kaj nokton », parolis li,

« mi estas okupita en la servo ĉe Sultano, jen esperante liajn favorajn, jen timante lian koleron. »

Zunun ekkompatis lin kaj diris :

— « Se mi timus Dion Plejsupran tiel, kiel vi timas Sultanon, mi estus la plej sincera veremulo. »

Se estus veziro timanta Dion, tiel, kiel timas li Ŝahon, certe li estus anĝelo.

El persa lingvo tradukis

E. Robrik

Recht (*Persujo*).

SPRITAĴOJ.

Patro al sia fileto kiu skribaĉas sur peco da papero.

— Kion vi faras Joĉjo ?

— Mi skribas al mia amikino Manjo.

— Kaj vi ne povas skribi.

— Estas nenio, ŝi ne povas legi.

Vojaĝanto al fiakristo.

— He fiakristo kiom vi postulas por konduki min al la stacidomo ?

— Kvar frankojn, Sinjoro !

— Kaj por miaj pakajoj ?

— Estas nenio, Sinjoro!

— Tiam vi konduku miajn pakajojn al la stacidomo, mi iros pieden.

Negro vizitas arĥimodernan artekspozicion. Rigardinte ĉiufanken li diris : « Tie ĉi mi sentas min hejme. »



El „ De Transportarbeider. ”

De Britsche Vereeniging van Esperantisten heeft een manifest uitgegeven waarin het volgende voorkomt:

« Esperanto, die een eenvoudige taal is en tegenover de verschillende nationaliteiten geheel neutraal staat, heeft sinds dertig jaren bewijzen geleverd dat zij bijzonder praktisch is en in staat de internationalistische gedachte klaar uit te drukken.

Aangezien wij gelooven in de noodzakelijkheid van een internationale verstandhouding tusschen de volkeren en van oordeel zijn dat het gebruik van Esperanto tot deze eenheid zal bijdragen en de taak der internationale organismen zal vergemakkelijken vooral bij het houden van kongressen

begroeten wij met vreugde de uitbreiding der beweging in het voordeel dezer internationale hulptaal en drukken de hoop uit Esperanto de plaats te zien innemen die haar toekomt in al de programmas van arbeidersopvoeding. Zij hopen dat de werklieden haar in stijgender mate in gebruik zullen nemen.

Het manifest is geteekend door een groot getal syndikalisten van naam, waartusschen Rob. Williams, Cramp, Swales, Purcell, Smillie, enz. enz.

RICEVITAJ.

Arbeider Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Oslo, Norvegujo.

Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Göteborg, Svedujo.

Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo.

Holanda Esperantisto. Eemnes, Nederlando.

Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo.

International Language. London, Anglujo.

Liberpensulo. Leipzig-Neustadt, Germanujo.

Litova Stelo. Kaunas, Litovujo.

La Semisto. Sabadell, Hispanujo.

Tyomiehen Viikkolehti. Helsinki, Finlando.

La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo.

Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

NOVA LERNLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernlibron ilustritan: COURS PRATIQUE D'ESPERANTO eldonita de Libraire centrale esperantiste, Paris, (192 paĝoj.) — Prezo : 6,50 fr.

Ĝenerala deponejo por Belgujo : A. P. P. K., Rotterdamstraat 91, Antwerpen

Speciala rabato por grupoj.

MIGRANTAJ KARTOJ A. P. P. K.

Uzu la plej praktikajn migrantkartojn.

Antaŭmilita prezo : 10 por 1 fr.

Por ĉiuspecaj PRESAĴOJ

adresu vin al la

PRESEJO „ ESPERO ”

LANGE VAN RUUSBROECSTR. 36, ANTWERPEN

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA



PROSPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHE STEENWEG 444

Ben. KOK

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTRAAT 51

1^A JARO

N^o 8

AUGUSTO 1925

Jara Abono

Belgujo : 2,50 Bfr.

Eksterlando: 4. — Bfr.

Unu Numero

" 0,25 Bfr.

" 0,40 Bfr.

Kongresrevado.

Kun miksitaj sentoj mi veturis al Genève.

Imagu! Ĉeesti Universalan Kongreson, mian unuan!

Kion ĝi alportos al mi? Kion, por mi ankoraŭ mistera, ĝi senvualigos? Ĉu ĝi donos al mi novan kaj fresigan forton por daŭrigi la laboron, komencitan antaŭ nur kelkaj jaroj? Ĉu mi vidos tie pli pacan bildon, ol tiu kiun mi vidis ĝis nun? Kaj tiuj inter ni, kiuj ne posedas ĝin, ĉu ili povos ĉerpi kelkajn gutojn el la fonto de la interna ideo? Ĉu ĝi redonos la kredon, tiun tiel bezonan kredon, al ĵuna idealisto, la sanktan kredon en pli bela, pli bona homaro, kiun li preskaŭ estis perdinta?

Miksitaĵ estis miaj sentoj! Ĝojo en la koro, iri al la granda familio. Restadi inter gefratoj, ĝis nun nekonataj; vivi inter ili tiun pacan vivon. Paroli, precipe paroli kun la fratoj el la malvarma nordo same kiel kun tiuj el la vekiganta oriento. Demandi pri nia movado, kiel kara al

ni; demandi ĉu ankaŭ en ilia rondo inter pacaj batalantoj oni.....

Ne, mi nekuragis elparoli mian kordoloron. Ne plu ĝojo en koro. Nur timo aŭdi la samon el frata buŝo; nur timo aŭdi, ke nia idealo ne indas tiun nomon.

En mia koro ĝojo kaj timo interbatalis pro la supereco!

* * *


En lago! Jam kelkan tempon mi ŝipveturas sur ĝi. Kiel revo ĝiaj ĉarmaj, belegaj bordoj preterpasas ravante miajn okulojn. Jen la Blanka Monto staranta flanke de verda! Eĉ la naturo ĝojas kun ni portante niajn tiel amatajn kolorojn. Stranga sed tamen bela aspekto, tiuj gigantaj montoj starantaj tie, kiel niaj gardangeloj. Tamen mia koro ne estas kvieta, ne povas forĵeti la erojn de la malbono dissemita!

Kaj dume la bluaj ondoj de la lago ensorcās min tute kiel la bluaj, allogaj okuloj de sireno, la zefiro, kiu agrable ĉirkaŭblovas miajn harojn, murmuretas al mia orelo: « Ne timu »! vidu ĉirkaŭen, vidu antaŭen!.... Bela viziono tiam aperis.

La lazura lago respegulis antaŭ miaj okuloj, lacaj je rigardado de ĝiaj misteraj ondoj, la gajajn vizaĝojn de homaj estaĵoj, manon en mano sur ŝipo « ESPERANTO » kiu distranĉas la helbluajn ondojn, portante la tutan rondon familian al nova hejmo en pli bona kaj pli harmonia mondo!

La ĝojo tiam venkis la timon.

A. Posener.



LA XVII^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

IMPRESOJ.

Fine do mi ĉeestos Universalan Kongreson! Mia deziro, interparoladi kun samideanoj el la plej malproksimaj landoj, konstati ke la bona interkonsento inter diverslingvo parolantoj estas efektivebla, plenumiĝos! Mi ne plu pensas al la antaŭdiro de bonintenca amiko: « Ne tiel intense deziru ĉeesti kongreson, ĝi eble seniluziigos vin! » Ne, mi antaŭsentas: estos la plena efektiviĝo de mia revo!

* * *

La rapidvagonaro ne sufiĉe rapidis laŭ mia opinio kaj kvankam ni iomete malfrue alvenis en Ĝenevo, la bela Kongresurbo, ni tamen, miaj amikinoj kaj mi, nelacigeblaj, tuj iris al: « Ĝardeno des Bastions » kie jam multaj samideanoj kunvenis kaj interrilatiĝis.

Imagu mian ĝojon, kiam, dimanĉon matene, la hotelmastrino anoncis al ni ke aliaj samideanoj jam estas en la hotelo, kaj, ke ŝi aranĝis la tablojn tielmaniere, ke ni estu kun ili. Ni, kompreneble, estis kontentaj kaj ni tuj interkonatiĝis kaj interbabiladis kun niaj gesamideanoj el Anglujo kaj Skotlando, kvazaŭ ni jam amikiĝis antaŭ kelkaj jaroj.

Ni ĉeestis la diservon en la Pregejo Notre Dame; la Pasto Corolfi el Firenze (Italujo) predikis en Esperanto.

Ankaŭ Evangelia diservo kun prediko okazis en la Katedralo de S^t Pierre.

Posttagmeze dum la K. R. kunsidis, la kongresanoj kunvenis en la Kongresejo « Le Bâtiment électoral ». La malbona vetero malhelpis la promenadon al « Parko des Eaux vives ».

Ni sincere konfesas ke ni ne multe aŭdis kaj ĝuis la belan muzikon; estis vera abelkorbo; la zumado estis multe pli forta ol la muziko, kaj tio estis komprenebla kaj pardonebla, ĉiu serĉis amikon aŭ korespondanton por interkonatiĝi persone.

Vespere solena malfermo de la Kongreso en « Victoria Hall ».

Impresiga, neforgesebla momento!

Centoj da homoj, diversnaciaj, entuziasmitaj solene kantis sian himnon « La Espero'n ». Estis kvazaŭ reĝo; impresio plifortigita per la orgenludo.

Pri la paroladoj, diversaj decidoj kaj rezolucioj de la Kongreso, la Somera Universitato, kaj la Fakkunsidoj mi ne parolos.

La ĵurnaloj sufiĉe raportis, kaj al la intersemuloj mi konsilas legi la Kongreslibron, kiu tre interesa estas.

Tamen mi ne volas preterlasi kapti la okazon ripeti la tre gravan deklaron de S^{ro} Oltramare, ĉefo de la Departemento de la Publika instruado de la Ĝeneva Respubliko. Li diris ke la Regna Konsilantaro de Ĝeneva Respubliko, kaŭze de la rezultato atingita de Esperanto en la lernejoj de Ĝenevo, estas preta eventuale peti de la Federala Registaro la kunvokon de internacia oficiala konferenco pri la enkonduko de Esperanto en lernejoj.

Tiu deklario faris al la ĉeestantoj grandegan impreson.

London Posttagmeze okazis ŝipekskurso sur Lago Ĝeneva.

Ni nun vere estis en Esperantistujo.

Mi ne kredas ke unu el la grandaj vaporŝipoj, kiuj vizitas nian havenon Antwerpen, jam enhavis dum unu vojaĝo sammulte da reprezentantoj el diversaj gentoj kaj nacioj kiel tiu ekskursŝipo. Ĉirkaŭ mil samideanoj el 33 landoj partoprenis la belegan ekskurson ĉirkaŭ la lagon kaj esprimis en Esperanto sian admiron pri la belaj naturmirindaĵoj. Tiam mia deziro plenumiĝis; ni parolis kun reprezentantoj el ĉiu lando kaj ni multe miris ke la elparolado de nia kara lingvo en ĉiuj landoj estas la sama. Kiom da poŝtkartoj, da libroj mi subskribis, mi ne plu memoras, sed estis multege.

Vespere, estis balo. Multe da kongresanoj surmetis sian nacian kostumon. Ĉe la pordo la C. K. bonvenigis individue

ĉiujn kongresanojn kaj afablaj ĝenevaninoj en bela nacia kostumo oferis freŝajn florojn al ĉiuj sinjorinoj.

Mardon, 4 aŭgusto: Vera labortago. Multe da esperantistoj ĉeestis la fakkunsidojn, dum aliaj ekskursis al la bela montaro en la ĉirkaŭaĵo de Ĝenevo.

Vespere: Ĝenerala Kongresa Kunsido en la Viktoria Hall. Kiel mi jam diris: ĉiuj raportoj pri tiu ĉi kunsido troviĝas en la Kongreslibro.

Multe aplaŭdita estis la sciigo ke la sekvontaj kongresoj okazos en 1926 en Edinburgh, en 1927 en Danzig kaj en 1928 en Antwerpen. Precipe la lasta urbo estis salutata per ĝojegaj aplaŭdoj; eble la malnovaj esperantistoj rememoris la agrablajn tagojn, kiujn ili pasigis en 1911 en Antwerpen.

Merkredon vespere okazis prezentado en la « Granda Teatro ».

Vera festo por la literaturamantoj. Krom kelkaj belegaj, originalaj poemoj de S^{ro} J. Baghy kaj kantoj de S^{ro} Kalocsay, kiuj multe plaĉis al la aŭskultantaro, oni prezentis la emocian dramon, « Ginevra », originale verkita de S^{ro} Privat laŭ kelta legendo pri la Kavaliroj de la Ronda Tablo de Reĝo Arturo. Kial do tiuj, kiuj ankoraŭ ĉiam dubas pri la efikeco de la internacia lingvo Esperanto, ne ĉeestis? Mi estas certa ke ili iĝus, de tiu momento, fervoraj esperantistoj kaj propagandistoj.

Ni tiel ĝuis tiun vesperon, ke, alveninte en Parizo, ni tuj iris « rue de Clichy » kaj aĉetis « Ginevra » de S^{ro} Privat, kaj « Preter la Vivo » de S^{ro} Baghy.

Ĵaŭdon vespere estis dediĉita al la memoro de nia Majstro Zamenhof, kies filinoj honoris la kongreson per sia ĉeestado. Emocie S^{ro} Privat rakontis pri la vivo de la grandanima, humana vivo per vortoj, kiuj venigis larmojn el la okuloj de la aŭdantaro; la plej granda kaj solena silento regnis dum S^{ro} Baghy per impresiga voĉo deklamis "La Majstro mortis,...

Multaj aliaj oratoroj laŭde parolis pri la Majstro kaj estis je la 12^a kiam oni fermis la XVII^{an} Kongreson.

Ankoraŭ adiaŭi la amikojn, deziri revidon en Edinburgh, en Antwerpen mem, kaj..... la belaj tagoj apartenas al la estinteco!

Mi vere povas diri al mia bonintenca

amiko: Ne, la kongreso ne seniluziigis min, kontraŭe, ĝi vekis en mi la deziron ĉeesti ĉiujn Kongresojn, kiuj en la estonteco okazos, kaj mi revenis el Ĝenevo pli fanatika esperantistino ol antaŭe.

Mi estas neŝanceble konvinkita ke tiaj kongresoj helpas je la bona interkompreniĝo inter la diversaj popoloj kaj tial ankaŭ je la mondpaco: idealo de ĉiu Esperantisto.

Entuziasmulino.

* * *

Ekskurso al Hemixem.

La 21^{an} de Julio la grupoj aliĝintaj al A. P. P. K. gaje kaj frate festis la unuan datrevenon de la fondiĝo de nia federacio. Multnombraj la gesamideanoj kunvenis apud la Urba Naĝejo, ĉar la programo estis sufiĉe promesplena por allogi ĉiujn.

Aŭtobuse ni veturis ĝis « HUIS TEN HALVE ». Tie nin bonvenigis Fraŭlino L. Keveryn, fervora kunlaborantino el Hemixem. Post agrabla promenado, Fraŭlino Keveryn enkondukis nin en sian domon, kie ŝiaj gepatroj tre kore kaj gasteme akceptis nin.

Jen, alia agrabla surprizo! Fraŭlino L. Buelens prezentis al ni sian korespondanton kaj gaston, S^{ro} J. Tomas, el Barcelona. Poste ni iris al la restaŭracio « S^t BERNARD » kie oni servis al ni simplan, sed bonegan festenon. La kunesto iĝis vere internacia, ĉar ankaŭ holandoj ĉeestis kaj baldaŭ eniris la gaja grupo « NIA IDEO » kun itala samideano.

Per babilado, kantoj, dancoj ni bone amuziĝis. S^{ro} J. Tomas faris malgrandan paroladon por saluti la belgajn gesamideanojn kaj deziris al ili bonan sukceson. S^{ro} Jacobs dankis. Li mallonge rezumis la laboron de la federacio dum la pasinta jaro, kaj atentigis ĉiujn je nia celo: oficialigi la instruadon de esperanto. Li precipe dankis Fraŭlinon Keveryn pro ŝia ŝatata helpo.

Intertempe ni ne forgesis propagandi, kaj ni povas esperi ke niaj klopodoj ne restos vanaj.

Vespere ni disiris, kontentaj pro la festo, esperplenaj por la estonteco!

Iĝu membro de
U. E. A.

La unua „Lustrum“ de A.G.E.D. 27^o de Julio 1925

Brilanta, verda stelo super la enirejo de « Centraal Schouwburg », lumiginte la ĉirkaŭaĵon, montris al ni, ke okazis festo en Esperantujo. La Antverpena grupo de Esp^a diamantistoj troviĝis en la granda, tiuokaze bele lumigita salono kun aro da gesamideanoj kaj neesperantistoj invititaj. Je la 8 1/2 h. la mandolinklubo « Bizet » sub la kapabla gvidado de S^{ro} Fr. Cocuijt, malfermis la festan akcepton per nia himno Ĉiuj ĉeestantoj ekstaras kaj kantas entuziasme. Post legado de kelkaj gratuloj leteraj kaj telegramaj, inter kiuj unu de S^{ro} Baesens el Mehleno, la prezidanto S^{mo} Jos. Swalf memorigas la historion de la grupo kaj esprimas sian ĝojon kaj fierecon, vidante ĉirkaŭ li la junularan kernon de bonaj Esperantistoj, kiuj ĉiam estas kaj restas viglaj kaj kiuj konstante kaj energie kunlaboradas al nia sankta tasko. Li deziras bonvenon al la multnombraj gesamideanoj, la estraro de la Diamantista sindikato, (A. D. B.) la estraro kaj precipe S^{ro} Ed. Dankaerts de la sekcio « Maatschappelijk werk » (socia laboro) kaj dankas kore ilin pro la financa helpo por atingi nian fincelon. S^{mo} D. Posener gratulas la prezidanton kaj ofertas lin kaj lian edzinon, je la nomo de la grupanoj, belegajn florojn. S^{ro} Jan Bartels, en la nomo de la estraro de l' A. D. B., esprimas sian simpatian por la Esp^a movado kaj promesas konstantan helpon al la grupo kaj la tuta movado. S^{ro} J. Jacobs, prezidanto de la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato direktas simpatiajn, laŭdantajn gratulojn al la aliĝinta grupo festanta kaj esprimas la deziron, ke ĝi restu tiel vigla kiel ĝi estas sub la gvidado de ĝia agema prezidanto. Li, i. a. instigas la ĉeestantojn kunhelpi por atingi nian ĉefan celon enkondukigi Esperanton en la oficialan instruadon.


Post la serioza parto, la amuza. La mandolinistaro aŭdigas kelkajn belegajn muzikajojn, bonega vino kaj frandaĵoj prizorgas la gajecon. En amikeca atmosfero ni vere sentas ke ni estas « granda rondo familia ».

La junularo (ankaŭ la maljunularo) ne plu povas resti sidantaj kaj subite

ĉiuj seĝoj malaperas el la mezo de l' salono kiu nun vidigas dancantajn parojn.

Sed ve ! Estas jam noktmezo, ni devas iri hejmen.

Manpremanante, salutante, kantante, ridante ni disiris, konservante belan, agrablan memoron.



KIE RENKONTIĜAS LA ANTVERPENAJ ESPERANTISTOJ ?

A.P.P.K. Marde, je la 8^a, en Centraal Schouwburg, Van Wezenbekerstraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj — La 1^{an} mardon de la monato, je la 8^a. 66-68 Plantijnlei.

Antverpena Polica Grupo Esperantista — en Policiernejo, Gildekamerstraat, 9.

Suda Lumo — Vidu A.P.P.K.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj -- Vidu A.P.P.K.

Nia Ideo — Merkrede, je la 8^a, en Volksgebouw, Meir.

INVITO

Gesamideanoj eksterlandaj, kiu, vizitante Italujon, laŭvojaĝos la fervojojn Venezia - Milano estas kore petataj halti en Vicenza kaj viziti S^{ron} Johano Vangelista, R. Poŝte (Poŝtoficisto).

OKUPO SERĈATA

Sinjoro Vojnar el Bohemujo serĉas okupon kiel bakisto, servisto aŭ kelnero en Belgujo aŭ Francujo. Du jarojn da praktika servo ĉe bakisto ; parolas boHEME, esperante kaj germane ; bonajn atesteojn. Respondon oni sendu al la redaktejo Boomsche steenweg, 444, Antwerpen.

NOVA LERNLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernlibron ilustritan: COURS PRATIQUE D'ESPERANTO eldonita de Librairie centrale espérantiste, Paris, (192 paĝoj.) — Prezo : 6,50 fr. plus sendkostoj.

Generala deponejo por Belgujo : A. P. P. K., Rotterdamstraat 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

MIGRANTAJ KARTOJ A. P. P. K.

Uzu la plej praktikajn migrantkartojn. Antaŭmilita prezo : 10 por 1 fr. plus sendkostoj.

Por ĉiuspecaj PRESAĴOJ

adresu vin al la

PRESEJO „ ESPERO ”

LANGE VAN RUUSBROECSTR. 36. ANTWERPEN

BULTENO

MONATA ELDONO
DE LA

ANTVERPENĀ
PROPAGANDA



PORESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHĒ STEENWĒG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

1^A JARO

N^o 9

SEPTEMBRO 1925

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo : 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando : 4. — Bfr.
" 0,40 Bfr.

INTERNATIONALE CONFERENTIE VOOR HET ONDERWIJS IN ESPERANTO.


GENÈVE 18-20 APRIL 1922.

De conferentie had plaats in de groote zaal van den Volkenbond. Afgevaardigden uit 28 landen, waaronder 16 officieel van verschillende ministeries, waren aanwezig. Gekozen werden; tot voorzitter Prof. Edmond Privat, tot secretaris onderwijzer William Perrenoud. Verder werden de heeren Prof. P. Bovet, J. W. Sevenhuijzen en Prof. Cart tot Eerededen van het Congres benoemd.

Uit het zaakrijk verslag knippen wij het volgende:

« Er werden van verschillende zijden bewijzen aangevoerd van de algemeene ontwikkelende waarde, die het onderwijs in Esperanto heeft, o. a. het leeren van logisch denken, het geven van scherper inzicht in de moedertaal, hulp bij de studie van vreemde en klassieke talen. De wensch, dat een grooter aantal onderwijzers dan tot nu toe het Esperanto zou gaan beoefenen, trad sterk op den voorgrond; het werd zeer betreurd, dat het onderwijs dikwijls moest worden gegeven door menschen, die daarvoor onbevoegd

of ongeschikt zijn. Daarom werd er met nadruk op gewezen, dat iedereen zijn invloed moest trachten aan te wenden om het Esperanto in de kweekscholen ingevoerd te krijgen. Over den leertijd bestond eenigszins verschil in meening, maar de meesten waren het eens dat **2 uren per week gedurende 2 jaren in het 6^{de} en 7^{de} studiejaar voldoende is.** Verder werd een manifest opgesteld, gericht aan alle onderwijzers over de geheele wereld, waarin het nut van het Esperanto werd uiteengezet en ten slotte werd opgewekt om bij de verschillende regeeringen aan te dringen het in al de scholen gelijktijdig in te voeren ».



La XX^a internacia Kongreso de ESPERANTO.

Kun ĝojo ni ekscias la novaĵon ke la tutmonda esperantistaro decidis en Genève okazigi la XX^{an} universalan kongreson de Esperanto en Antwerpen en 1928. Jam la pasintan jaron oni demandis al niaj delegitoj en la kongreso de Wien pri la ebleco organizi la XVII^{an} en nia urbo. Kvankam la Antverpena Poresperanto

administracio de la finnaj publikaj lernejoj.

La granda afero de la mondlingvo ne estas atingonta sian celon sole per tio, ke la lingvo mem estas kreita, ke estas trovita taŭga ilo por la interkomunikado de la nacioj. Restas dua kaj eble la pli malfacila parto de la tasko: la disvastigo de la lingvo. La problemo de la disvastigado estas solvebla nur per instruado kaj sekve per helpo de lernejoj.

Tio estas ĝenerale komprenata. La porbatalantoj de esperanto en ĉiuj landoj jam de longe klopodis akiri por sia lingvo lokon en la publikaj lernejoj. Kaj la ligo de nacioj, kiam ĝi direktis sian atenton al tiu-ĉi afero, antaŭ ĉio demandis: kiom estas la instruado de esperanto disvastigita en la diversaj landoj?

Ni scias, ke tiu instruado estas oficiale aŭ neoficiale iniciata en multaj urboj kaj landoj, sed ni devas konfesi, ke la tasko ne estas plenumita, ke la instruado de esperanto nun ĵus komencis realiĝi. La plenumo dependas je granda parto de l'instruistoj, de ilia rilato al la mondlingva problemo. Estas vere, ke la registaroj kaj la parlamentoj decidas pri la afero. Sed ni scias, ke la registaroj kaj parlamentoj estas direktataj de la publika opinio, en tia okazo sendube antaŭ ĉio de la opinio de instruistoj kaj pedagogoj. Jen afero por propagando. La esperantistoj en la instruista fako do devas klopodi konvinki siajn proksimajn laborkamaradojn, varbi adeptojn inter ili.

Por tia tasko ili jam havas aron de la taŭgajarmiloj, kiel ni ĉiuj scias. Sed mi deziras uzi tiun-ĉi okazon por direkti vian atenton al punkto, kiu havas la plej grandan gravecon ne nur por la mondlingvo, sed samtempe ankaŭ por la ĝenerala instruado, speciale por la mezlernejoj.

En la nuna tempo la lingvaj studoj okupas tre vastan spacon en la studplano de la mezlernejoj. Antaŭ ĉio la malgrandaj popoloj estas sursargitaj per studado de multaj fremdaj lingvoj. En Finnlando ekzemple ni havas, krom la patrina lingvo, tri aŭ kvar fremdajn, kiuj okupas almenaŭ la duonon de la instrua tempo. Eble en kelkaj aliaj landoj eĉ pli multe da tempo estas alproprigata al lingvistoj. Kaj la rezultatoj? Pro la nombro kaj malfacileco de tiaj lingvoj neniu el ili estas ĝisfunde ellernata. Mal-

ofte oni akiras kapablon konversacii kun eksterlandano aŭ korespondadi kun li. Post kelke da jaroj estas forgesitaj eĉ la konoj, necesaj je la kompreno de la literaturo de studitaj fremdaj lingvoj, se oni iam ilin posedis.

La lingvistado tiel fariĝis por la lernejo laboro, kies valoro apenaŭ egalas tiun penon. Laŭ mia opinio tiuj-ĉi studoj malfaciligas naturan evolucion de la meza lernejo — mi kredas en la plej multaj malgrandaj landoj. Ili malhelpas tiun lernejon fariĝi tiel, kiel la nuntempa vivo kaj la moderna pedagogio ĝin postulas.

En tiu situacio oni turnas la rigardon al la internacia helplingvo. Ĉu estas trov-ebla iu helpo tie-ĉi? Unuj neas, aliaj emfaze jesas. La unuaj timas, ke la helplingvo nur pligrandigos la pezon de la lingvistadoj, ke ĝi nur pliiĝas la nombron de fondotaj fremdaj lingvoj. La duaj provas, ke tio estas evitebla, se oni provizore faros la helplingvon alternacian kun iu alia lingvo. Siatempe la mondlingvo faros unu aŭ du, eĉ ĉiujn aliajn fremdlingvojn superfluaĵn.

(Daŭrigota)

* * *

Oficialaj kursoj

Ni insiste petas la samideanojn varbi lernontojn por la oficialaj kursoj, kiuj okazos 2 vesperojn ĉiusemajne en la urbaj lernejoj de Kasteelstraat kaj Violetstraat.

La kursoj estas alireblaj de ambaŭ seksoj. Oni povas enskribi de la 21^a Sept^r.

Officieele Avondleergangen in Esperanto

De personea die Esperanto wenschen te leeren, moeten zich laten inschrijven in de gemeenteschool der Kasteelstraat of der Violetstraat.


De leergangen zullen plaats hebben 2 maal per week. Zij zijn toegankelijk voor beide geslachten. De inschrijvingen beginnen 21 Sept. a. s.

**Ĝu membro de
U. E. A.**

Propaganda Komitato estis tuj preta por dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la sukcesigo de tiu ĉi kongreso, ke jam duonoficialaj promesoj pri morala kaj financa subteno de la lokaj aŭtoritatuloj estis ricevitaj, estis opiniita ke pli bone estas atendi ankoraŭ 2-3 jarojn. Multaj esperantistoj, tiel eksterlandaj kiel enlandaj, bedaŭris tiun ĉi decidon. Ĉiuj esperantistoj, kiuj ĉeestis la VII^{an} en 1911 laŭde parolas ankoraŭ pri ĝi kaj la pruvo ke la tutmonda esperantistaro havas plenan fidon en ni, estas ĝia nunjara decido.

La Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato plene konscias la gravecon de la organizo de universala kongreso kaj deziras de nun labori por ĝia sukceso. Ni sincere esperas ke ĉiuj antverpenaj esperantistoj laboros kune en la plej plena harmonio al la organizado de la XX^a. Per la valoraj eksperimentoj de la restantaj anoj de la « Sepo por la Sepa », la saĝaj konsiloj de la malnovuloj kaj la flama entuziasmo de la novuloj la XX^a devas, se eble estas, superi la VII^{an} kaj esti vera triumfa festado en la esperanta movado.

A.P.P.K.



Vizito de la Grupo Esperantista el Bergen-op-Zoom

Dimanĉon 19^{an} de julio, la grupo esperantista el Bergen-op-Zoom honoris nin per sia vizito. Anoj el diversaj lokaj grupoj atendis niajn gastojn ĉe la alveno en S^t. Jansplaats. Jen la vaportramo.

Verdstelaj flagetoj, pro feliĉo radiantaj vizaĝoj, koraj manpremoj, necesaj prezentoj, kaj gaje babilante oni iris al la sidejo de A.P.P.K.. En la granda salono de Centraal Schouwburg okazis la oficiala akcepto.

Per kelkaj vortoj S^{ro} Jacobs deziris bonvenon al la nederlandaj samideanoj. Je la nomo de la gastoj respondis per profundsentitaj vortoj la prezidanto, S^{ro} Holleman. Kantemulo tuj gajigis la amikaron per kelkaj belaj kantoj.


Poste komenciĝis la promenado tra la urbo kun vizito de la laŭvojoj vidindaĵoj: Reĝa Ateneo, statuoj en Victorieplaats, nederlanda teatro, flandra operejo, preĝejo S^a Jakobo, dimanĉa vendejo en

Oude Vaartplaats, botanika ĝardeno, ĉefpreĝejo. En la katedralo niaj gastoj povis admiri la mondfamajn majstroverkojn de Rubens, kiuj estis malkovritaj.

Estis la 1^a p. m. kaj tempo por kontentigi siavice la malplenan stomakon kaj la ripozpetantajn piedojn.

Je la 3^a ĉiuj samideanoj renkontiĝis en Groenplaats. De tie oni iris al la malnova parto de la urbo: Groote Markt kun la Urbdomo, la gildodomoj kaj fontano de Brabo; la muzeoj en Vleeschhuis kaj Steen, kiujn oni vizitis.

Tiu-ĉi parto de la programo celis kontentigi la seriozan, artamantan flankon de niaj gastoj; nun sekvis la pli amuziga; transveturado de la Schelde, vizito al la urbkvartalo S^t. Anna, manĝado de mituloj kaj angiloj kaj poste amuzado en la kir-mesa foiro. La alie plej seriozaj samideanoj ne povis kontraŭstari la allogon rajdi sur la lignaj ĉevaletoj de karuselo. Tiamaniere rapide forpasis la tempo kaj alproksimiĝis la tempo de la disiro. Post mallonga promenado laŭlonge de la bordo de la Schelde, dum kiu niaj gastoj povis admiri la panoramon de la urbo kaj aŭdigis la gajaj esperantaj kantoj de la junularo, kantoj kiuj mirigis la ceterajn promenantojn, oni decidis reveturi al la urbo kaj konduki niajn holandajn samideanojn al la loko de forveturo. Jen alvenas la vaportramo! Reciprokaj dankesprimoj, deziroj de baldaŭa revido, lastaj koraj manpremoj kaj la fera monstro forkondukas niajn karajn gastojn al ilia hejmo. Malrapide, la antverpenaj samideanoj disiris ĝojante pri la frate travivita esperantotago.



La Instruado de Esperanto

Parolado farita de S^{ro} Mikael Soininen, eksministro, parlamentano, ĉefdirektoro de la administracio de publika instruado, al la ĝeinstruistoj, kunvenintaj en faka kunsido dum la XIV^a universala Kongreso de Esperanto en Helsinki.

Estimataj Gekongresanoj,

La ministro de la instruado min petis prezenti sian saluton al vi, instruistoj-kongresanoj, tien ĉi kunvenintaj: Mi salutas vin ankaŭ kiel ĉefdirektoro de la

NOVA LERNLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernlibron ilustritan: COURS PRATIQUE D'ESPERANTO eldonita de Librairie centrale espérantiste, Paris, (192 paĝoj.) — Prezo: 6,50 fr. krom sendkostoĵ.

Generala deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotterdamstraat 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

MIGRANTAJ KARTOJ A. P. P. K.

Uzu la plej praktikan migrantkartojn. Antaŭmilita prezo: 10 por 1 fr. krom sendkostoĵ.

INVITO

Gesamideanoj eksterlandaj, kiuj, vizitante Italujon, laŭvojaĝos la fervojon Venezia - Milano estas kore petataj halti en Vicenza kaj viziti S^{on} Johano Vangelista, R. Poŝte (Poŝtoficisto).

La XX^a Kongreso en 1928 en Antwerpen

Vidite la necesecon, jam de nun varbi lernontojn inter la personaro de publikaj servoj por kulturaj lertajn Esperantistojn, A.P.P.K. komunikis kun la Nacia Sindikato de oficistoj de Fervojoj, Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Maraj oficejoj.

La estraro volonte interkonsentis kaj decidis organizi paroladon pri Esperanto, sekvota de kurso en la lernejo de la Sindikato, Carnotstr. 112. E. U.

La dato de la parolado estas fiksita je Merkredo, 30^a de Septembro 1925, je la 8. horo vespere.

* * *

Gezien de de noodzakelijkheid nu reeds leerlingen te werven onder het personeel van de openbare diensten om bekwame Esperantisten te kweeken, heeft A.P.P.K. zich in verbinding gesteld met het Nationaal Syndikaat van Y. P. T. T. Z.

Het bestuur stemde geheel met ons voornemen in en besloot een voordracht-avond over Esperanto in te richten, te volgen door een leergang in het Schoollokaal van het Syndikaat, Carnotstraat, 112. T. S.

De datum van de voordracht is vastgesteld op Woensdag 30 Septemer a. s. om 8 uur s'avonds.

* * *

KIE RENKONTIĜAS LA ANTVERPENAJ ESPERANTISTOJ ?

A. P. P. K. Ĵaŭde, je la 8^a en Centraal Schouwburg, Van Wezenbekestraat, 10. **Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj** — La 1^{an} mardon de la monato, je la 8^a, 66-68 Plantijnlei.

Antverpena Polica Grupo Esperantista — en Policiernejo, Gildekamerstraat, 9.

Suda Lumo — Vidu A.P.P.K.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj — Vidu A.P.P.K.

Nia Ideo — Merkredo, je la 8^a, en Volksgebouw, Meir.

RICEVITAJ.

Revuoj.

Arbeider Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Göteborg, Svedujo. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — Il Cantastorie. Catania, Italujo. — El Heraldo Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Holanda Esperantisto. Eemnes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Informoj de Esperanto-Asocio. Tallinn, Estonio. — La Interligilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Libera Laboristo. Paris, Francujo. — Liberpensulo, Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid, Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelo. Kaunas, Litovujo. — Literatura Informilo, de la eldonejo Hirt & Sohn, Leipzig, Germanujo. — La Semisto. Sabadell, Hispanujo. — Suda Kruco, Melbourne, Aŭstralio. — La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo. — Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

* * *

Libroj, katalogoj, flugfolioj, k.t.p.

Prospekto de **Esperanto**, eenvoudig Esperanto-leerboek voor cursussen en zelfonderricht door P. v. Dokkum. Uitgave van P. Noordhoff te Groningen. — Prezo: fl. 1.25.

Ilustrat Abecedarie del Lingue Medial European, de Josef ed Betti Weisbart. Nürnberg.

Prospekto Ilustrita de Foiro de Frankfurt A. M.. 4 - 7 Oktobro 1925.

Evoluo de la Leipzig'a Foiro. Paul Voss, Leipzig, Germanujo.

Ĉiuj menciitaj revuoj, libroj, katalogoj, k. t. p. estas je la dispono de niaj membroj.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
E
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTRAAT 51

1^A JARO

N^o 10

OKTOBRO 1925

Jara Abono

Beljujo : 2,50 Bfr.

Eksterlando: 4. -- Bfr.

Unu Numero

" 0,25 Bfr.

" 0,40 Bfr.

KAJ MI PREĜIS

Hodiaŭ mi preĝis.

Jam de longe mi ne plu faris tion, eĉ forgesis ke ekzistas io al kio oni preĝas.

Jam, kiam la animo estas plej sentema, kiam ĉiu impresoj lasas postsignojn en mia infaneco, mi klinis la kapon teren kaj petegis ion de Li, kion nur Li sola povas plenumi. Mi petegis Lin, ne forpreni de mi mian fraton tre malsanan, jam mortanta. Sekigi la larmojn de tiuj, kiuj tre amis lin, lasi al la arbo la preskaŭ maturan frukton. Ne cedis Li al mia preĝo kaj mia funebra infankoro ploriskaj perdis la kredon en Li.

De tiam mi vivis sen kredo en Li, la superhomo, kaj en tiuj kreitaj de Li laŭ sia propra figuro bildo.

La infano plenkreskis. Li vivis kaj laboris en feliĉo kaj malfeliĉo sentante tamen en tiu vivo ian mankaĵon. Vivo sen kredo ne povas esti vivo. Similas al koro sen animo, similas al tago sen sunbriloj. Ĉiu homo bezonas kredon. Ĉi tiu, la kredon kiu fortigas lin en lia malfacila lukto por la tago pano, tiu la kredon kiu

gvidas ĉiujn liajn agojn. Sed kredo, en io ajn, necesegas por ĉiu vivovojaĝanto, por ne laciĝi sur la longa, multfoje seniluziiga vojo de l'vivo. Tamen mi ne povis.

Sed venis en la mondon nova kredo! Esperantismo - Homaranismo - Kiel nova religio ĝi disvastigis en la mondo, de longe jam terurigita per multaj diversaj turmentoj. Ĝiaj unuaj disciploj trairis la mondon kiel apostoloj; predikante la novan kredon staranta super la homaj malkonsentoj, celanta per sia interna ideo la kunligon de la homaj rasoj, ĉu blanka, ĉu kolora, krei novan ligilon inter la popoloj dividitaj pro kaŭzoj ĉiaj ajn.

Multa, kaj tamen tro malmultaj, alprenis la novan kredon; ankaŭ la viro vivinta tiel longe sen kredo. Nun lia vivo ne plu ŝajnas esti tiel malplena. Nun lia grandanima koro denove ŝvelis pro vivoĝojo kaj plenanime sin donis al tiu homama religio. Sed kial do, li pensis, ne ĉiuj adeptoj kredas kiel li? Kial do, ne ĉiuj alprenis, en la nova kredo, la internan ideon? Kial

do, el ĉiu dissemita verda semero ne ekfloris bela, tutverda floro? Kial do, ne ĉiuj kredas en Li..... ĝia Kreinto?

Denove lia animo plendas, lia koro ploris.

* * *

Tamen hodiaŭ, ĉu estis nun la memoro al tiu vivo sen kredo, aŭ estis la milda silento de la ripozatago kiu, elversante ĝian dolĉan kvietecon en mian animon instigis min al la preĝo.

Mistero de l'animo!

Sed la iama kredoperdinta infano, nun viro, kredante per sia tuta animaforto en la interna ideo de la nova religio, ekstaris, denove klinis la kapon teren

Kaj mi preĝis


«Al vi, Majstro, tiel malproksima de ni, kaj tamen tiel proksima, ke via spirito ĉiam-ĉirkaŭŝvebu nin kaj gvidu niajn agojn.»

«Forpelu el nia mezo la malbonajn spiritojn, la seninternideulojn, kiel iam el la templo estis forpelitaj la brokantistoj»

«Igu sukplenaj per via interna ideo la sekajn branĉojn al nia trunko, por ke ĝi fariĝu bela fruktodona arbo, harmonianta kun la tutfreŝa verda naturo»

«Ordonu, ke ĉiuj ni agu laŭ viaj ordonoj, ke ni vivu en plena konkordo kaj severa unueco.»

A. Posener.



Ekskurso al Hemixem

Okaze la Hemixema Kermeso, la 1^{an} pasinta monato, f^{ino} Keverijn tutkore invitis la A. P. P. K. 'anojn ĉeesti la tieajn festojn.

Bonkore ni estis akceptita de Gesinjoroj, Keverijn, kiuj regalís nin per la fame konala flandra rickaĉo, kiu tiel bonege gustis, ke ĝi instigis nin al reiro al tin ideallando.

F^{ino} Swalf kaj Keverijn zorginte pri la muzik parto, amuzis nin per ilia vera interesa pianludado kaj kantado. Ankaŭ S^{ro} Jacobs nin ravis per sia agrabla kordludado.

Nur bedaŭros tiuj, kiuj ne kuniris.

Sinceran dankon ni ŝuldas al la familio keverijn pro ilia tutkara ĝastemeca.

J. C.

La Instruado de Esperanto

Parolado farita de S^{ro} Mikael Soininen, eksministro, parlamentano, ĉefdirektoro de la administracio de publika instruado, al la ĝeinstruistoj, kunvenintaj en faka kunsido dum la XIV^a universala Kongreso de Esperanto en Helsinki.

(Daŭrigo)

Esperanto jam atingis en komerco, en turismo, en kongresoj, en privata korespondado gravecon, kiu ne estas preterlas ebla. Por la pli altaj studoj kaj la scienco ĝi baldaŭ same fariĝos utila, eble necesa. Dank' al la facileco de esperanto la akirebla kono de tiu-ĉi lingvo fariĝos kontentiga kaj multe da tempo en la lernejoj estos ŝparata.


Ĉu tio estos iluzio? Ni havas konvinkon, ke ne. La estonteco donos la definitan respondon. Sed mi volas diri, ke estas malfacile imagi, kian grandan evoluon de la instruado en mezlernejoj tio ĉio signifas, se ĝi ne estos iluzio. Kíom da tempo liberigás por studado de la historio, de la literaturo, de la naturo kaj de la teĥniko! La kapitala graveco de la instruado transiros al la realaj studoj, la esenco de la civilisacio.

Tia maniere la enkonduko de esperanto en la lernejoj eble iniciatos novan epokon de la publika instruado. Jen perspektivo ebla inspiri cirklojn de instruistoj ĝis nun ne - esperantistoj.

Oni kelkfoje diris, ke la esperanto propagandisto devas paroli malmulte pri la estonta graveco de la lingvo kaj multe pri ĝia nuntempa signifo. Prave dirita, sed nur duone vere. Mi verŝajne ne eraras, se mi diras, ke en niaj tagoj la ĉefa fonto de l'entuziasmo estas la grandegaj ŝancoj de la mondlingvo pli ol ĝiaj ĝisnunaj akiraĵoj. Ni devas direkti la rigardon ankaŭ antaŭen, ĉerpi forton el la idealo. Ni sekvu la ekzemplon de la malnova granda Ĉeĥoslovaka pedagogo JAN AMOSO COMENIO, kiu jam antaŭ tri jarcentoj kuraĝis revii pri la mondlingvo kaj klare

vidis la vastajn profitojn akirotajn per tiu-ĝi.

Mikael Soininen.



Ne Faru al aliaj...

La pasintan someron premenante tra la kamparo, mi atentis pri abelujo troviĝanta sur farmo korto. Kvan-kan mi jam multfoje vidis similan kampan bildon, mi tamen resta dis por rigardi. Ĉu estis la ĉiama laboremece de la abeletoj, aŭ la senĉesa flugado de floro al floro kaj reen al la korbo, kie ili kolektas guton post guto la bongustan dolĉaĵon, tiel ŝatata de tiuj, kiuj eĉ ne kunlaboris, kiu min allogis? Mi ne scias. Sed la malgrandaj diligentaj laboreguletoj instigis min al meditiado, kiam dolorkrio diŝŝiris la kamp(ar)an silenton. Kio okazis? Malbonulo estis trarampinta la kreskaĵbarilon intencante forpreni tion, kio ne apartenas al li.

Sed ve! la malbonula mano!

Ĉu li ne sciis ke la naturo, donacante al ĉiuj malfortuloj, kiajn kian, armilon por ilia defendo, ankaŭ ne forgesis doni pikilon al la abeletoj? Kaj la etaj laboreguletoj, kiuj ĝis nun kanzumante laboris, aŭdigis nun alitonan zumadon kaj solidare atakis tiun, kiu per unu manpleno volis forrabi la dolĉan frukton de ilia longa laborego!

Ve! tiu mano!

Tiun bildon de vera fortika unueco mi memoris dum nia lasta kunveno. Ĝi tiel similis al abelujo. Zumantaj A. P. P. K. 'anoj interbabiladis kaj preparols la lastajn okazintaĵojn. Kiel ili senĉese laboris, kiel ili paŝon post paŝo progresis, kiel ili traboris la granitan muron kiu ĉirkaŭas la estrojn de la publika instruado.

Ili, same kiel la abeletoj, flugis tien kaj reen ĉiu alportante erojn, kiuj, kunmetitaj, nun formas ion, kio restos la plej bela perlo en la krono de A. P. P. K: la definitiva enkonduko de Esperanto en la Publikan Instruadon. Ĝi ne fanfaronas pri tio, sed nur bedaŭras, ke ĝi ne povas donaci tion alla tutmonda Esperantistaro kiel la frukton de tutantverpena kunlaborado.

Humila, kiel la diligentaj abeletoj, ĝi estis; humila ĝi restos kaj ne atendas


laŭrojn pro io, kio ĝi konsideras esti la unua devo de ĉiu honesta intern idea esperantisto. Ĝi restos fidela al sia celokaj ĉiam sekvos celkonscie la rektan linion. Iam la realeco, la faktoj mem parolos ja por ĝi!

Sed mi demandas, ne, postulas per ĉiuj miaj fortoj, ke almenaŭ oni estimu nian laboron! Kaj al miaj gegurpanoj mi diras:

Memoru la abeletojn!

Akrigu vian pikilon kaj defendu, kiel la abeletoj, la frukton de via senĉesa honesta laboregado!

A. Posener



La XXIV^a Internacia Kongreso de Paco

La Kongreso,

”deklaras sin favora por la helpo lingvo tutmonda Esperanto; invitas la edukistojn de ĉiuj gradoj, uzi ĉiujn rimedojn por instrui ĉi tiun lingvon helpan al iliaj lernantoj kaj tio de kiel eble plie juna aĝo».

Tiun-ĉi rezolucion voĉdonita de la plejmulto, proponis la Esperantista Sekcio de profesoroj de duagrada iustruado en Ĉekoslovakujo (Praha), Esperantista Klubo en Brno, Franca Societo por propagando de Esperanto kaj Pariza grupo.

**Iĝu membro de
U. E. A.**

Sciigoj

La Internacio Kongreso de la "Trade Unions", okazinta en "Scarborough", Septembro, decidis uzi Esperanton kiel internacia lingvo por la tutmonda korespondado. La organizacio enhavas kvar miljonoj da anoj,

La Internacio Kongreso de Spiritistoj okazinta en Paris, Septembro, decidis uzi Esperanton kiel internacia lingvo kaj jam uzi ĝin dum la venonta Intern. Kongreso,

La Haga tramway - kompanio promesis al tiuj siaj oficistoj, kiuj gajnas la Esp. diplomon, donacon de 25 florins.

Francujo.

Laŭ peto de deputito **Couteaux** je la nomo de 52 el siaj kolegoj ĉe la parlamento kaj de S-ro **Kempf**, prez. de Komerca Ĉambro Parizo, je la nomo de tiu ĉi kompanio, la franca Ministro por Publika Instruado nuligis la dekreton de eksministro Bérard kaj permesis organizi Esp. kursojn ĉe la publikaj lernejoj.

Personoj, kiuj mendos jarabonon al „Bulteno“, por 1925, ricevos senpage la numerojn 10 - 11 - kaj 12 de 1925


ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ

Ekaperis: Serio de 10 ilustritaj poŝtkartoj sur bela kartono, lukse presitaj. la prezo estas po serio fr. 1 —

Haveblaj: Groote Beerstraat 7. E. U. kaj ĉe ĉiuj anoj de A - P - P - K.

La teksto sur la karto estas trilingva: Esp^a. flandra kaj franca, do ankaŭ uzebla de neesperantistoj.

Mendu tuj!



NOVA LERNLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernlibron ilustritan: COURSE PRATIQUE D'ESPERANTO eldonita de Librairie centrale espérantiste, Paris, (192 paĝoj.) — Prezo: 6,50 fr. krom sendkostoj.

Ĝenerala deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotterdamstraat 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

MIGRANTAJ KARTOJ A. P. P. K.

Uzu la plej praktikan migrantkartojn.

Antaŭmilita prezo: 10 por 1 fr. krom sendkostoj.

Por ĉiuspecaj PRESAĴOJ

adresu vin al la

PRESEJO „ ESPERO ”

LANGE VAN RUUSBROECSTR. 36, ANTWERPEN

KIE RENKONTIĜAS LA ANTVERPENAJ ESPERANTISTOJ ?

A. P. P. K. Ĵaŭde, je la 8^a en Centraal Schouwburg, Van Wezenbekestraat, 10. **Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj** — La 1^{an} mardon de la monato, je la 8^a, 66-68 Plantijnlei.

Antverpena Polica Grupo Esperantista — en Policiernejo, Gildekamerstraat, 9.

Suda Lumo — Vidu A.P.P.K.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj — Vidu A.P.P.K.

Nia Ideo — Merkrede, je la 8^a, en Volksgebouw, Meir.

RICEVITAJ.

Revuoj.

Svislando. - Karto kaj gvidiloj por turistoj. Eldonis la Svisa Centra Turisma Oficejo. Formato 60 - 40. Unuflanke geografiakarto, aliflanke teksto kaj ilustraĵoj. Senpage havebla ĉe la nomita oficejo.

* * *

Arbeider Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Göteborg, Svedujo. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — Il Cantastorie-Catania, Italujo. — El Heraldio Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Holanda Esperantisto. Eemnes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Informoj de Esperanto-Asocio. Tallinn, Estonio. — La Interligilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Libera Laboristo. Paris, Francujo. — Liberpensulo, Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid, Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelo. Kaunas, Litovujo.

La Semisto. Sabadell, Hispanujo. — Suda Kruco, Melbourne, Aŭstralio. — La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo. — Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

* * *

Libroj, katalogoj, flugfolioj, k.t.p.

Ĉiuj menciitaj revuoj, libroj, katalogoj, k. t. p. estas je la dispono de niaj membroj.

BULTENO

MONATA ELDONO
DE LA

ANTVERPENAJ
PROPAGANDA E
FORSPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Ben. K&K}
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

1^a JARO

N^o 11

NOVEMBRO 1925

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo : 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 4. — Bfr.
" 0,40 Bfr.

La Eterna Flamo

2an de novembro. Funebra tago. Rememortago al la mortintoj. Sankta tago por tiuj, kiuj iam karan estajon konfidis al la tero, al tiu malvarmeta silenta tombo, kiu ĉiam ricevas, neniam redonas. En kiu oni kviete dormas la eternan dormadon, pli dolĉe ol en la brakoj de sia amantino, malproksime de l' malbono, del' malvero kiu regas en la nuna mondo. Ĉielo malhelgriza ŝajnanta funebri kun la homoj, kiuj iros al la tomboj por preĝi por la anima trankvileco de siaj iamaj gekaruloj.

Reekflamo de la eterna flamo de l' malĝojo.

11an novembro. Estas la 11a matene. Historia horo. Mondfestatago. Lastfoje la kanonoj disŝutis morton kaj detruon inter homkorpoj, kvazaŭ la ŝtalaj monstroj volas elkriegi sian ĝojon neniam plu devi mortigi kaj nun esti aliforgotaj en plugiloj bezonaj por la kruda kampo de la paco! Nun ili ne plut rafos la koron de la

patrinoj en la karno de iliaj filoj.

Neniam plu milito! Tiu ĝokrio vibras tra la tuta mondo, tremigante la korojn de miloj da gepatroj, milionoj da infanoj, kiuj dezirege atendis la revenon de siaj tiel longtempe forrestintoj

Tamen, mondfunebra tago ĝi estas ankaŭ. Kruela rememortago! Sed nun niaj pensoj flugas al la senkulpaj viktimoj de la terura mondmilito, al la milionoj da patroj kaj filoj kiuj, malproksime de sia hejmo ripozas en fremda tero, al tiuj kiuj donis sian sangon, sian vivon por donaci al la postrestantoj pli konkordan mondon. Ĝis hodiaŭa tago ĝi ne efektiviĝis. Kaj la eterna flamo de la infera malbono brulos por tiuj, kiuj per orumitaj mensogoj antaŭenpelis ilin en la morton; kiuj nuntage ankoraŭ restas surdaj je la krioj de la homaro sopirante al paco!

Je tiu tago ankaŭ multaj iros al la tombo de sia trofrue mortinta karulo.

Lasta konsolo! Sed eĉ tiu-ĉi konsolo ne estas destinata al ĉiuj. Ne al tiuj kies patro, kies filo povus esti la nekonata soldato. Al ties tombo ili pilgrimis

Hejmolando, nur al vi,
Mi en malproksimo revas ;
Vin el kor' salutas mi.

Sankta via verdarbaro,
Via valo kaj la mont'.
Hejmrevido, vi, nektaro
De l'plej pura Dia font' !
Kara hejmo, nur al vi,
Hejmolando, nur al vi,
Mi en malproksimo revas ;
Vin el kor' salutas mi.

Sed la sorto ne permesas.
Tra la mondo migru mi !
Al vi, hejmo, mi konfesas
Kun varmega emoci' :
Kara hejmo, nur al vi,
Hejmolando, nur al vi,
Mi en malproksimo revas ;
Vin el kor' salutas mi.

Laŭ la Germana de Karl Kroner tradukis
Juul Karnas.

Kolonjo la 13/1/24 a,

* * *

Korsopiro

Malrapide, tag' senfina
Iras for post tag'sen fin'.
Ĉu neniam, karulino,
Mia kor' retrovos vin ?

Ga je ridas en la strato.
Estas voĉo de knabin'.
La spirito mia dubas
Ĉu vi jam forgesis min ?

Nur momenton, ĉar dolĉege
Ekaŭdiĝas el la kor' :
"Amatino ne forgesis,
Vin revidas en memor."

Malĝojego, tag'senfina,
Pli rapide iru for,
Por ke baldaŭ, karulino,
Vin retrovu mia kor' !

Antverpeno, 15-7-24

Juul Karnas.

—*—

KIAL ?

Jam de la apero de nia Bulteno, ni
dissendis ĝin al la tutmonda redaktaro
de revuoj kaj gazetoj. Inter aliaj ankaŭ la
direktoro de Belga Esperantisto ricevis
regule kaj ĉiumonate du ekzemplerojn.
Por personoj, kiuj ne konas la ĵurnalist-
ajn kutimojn, mi volas klarigi, ke la rice-
vanto ordinare recenzas pri la ricevitaj
verkaĵoj, revuoj k.t.p. La direktoro de
B.E.eĉ ne menciis nian ricevon, kvankam
li jam ricevis dekfoje 2 ekz de nia Bulteno.
Ni ne povas devigi lin fari tion, sed ni sa-
tus scŭ la kialon.

BULTENO.

* * *

Demando al Antido

Dum alia ŝercemulo estas reformanta
vian « Nov Esperanto » en Plinov-Espe-
ranto » kian lingvon nian propagandistoj
povas akceptigi nuntempe kiel interna-
cian lingvon en la oficialajn instituciojn ?

A. POSENER

* * *

GRAVA VENKO !!!

La Komunuma Konsilantaro de NI-
MEGEN decidis dum sia kunsido de
Merkredo 21 Octobro per 29 kontraŭ
3 voĉoj la enkondukon de Esperanto
en ĉiujn popollernejojn.

—*—

Iĝu membro de
U. E. A.

La tomo kun la eterna flamo !


Ni iru kune !

Kial ? Ni perdis nek patron, nek filon, nek fraton ! Kial ja ? ni irus al tiu loko, kiu nur povas aperigi-kiel en timiga inkubo - la terurajn bildojn de nehumana hombuĉado ; al la loko kie, super la korpo de mortinta hominfano, brulas ankoraŭ flamo, kies varmego nur povas esti bruligi la flamon de la malamo en la malsanaj mensoj de la nuntempaj homoj . Kial ja ? ni pacaj batalantoj, ni irus al la tomo de tiu humila homido, kiu nur nun, post sia vivo, havas tiom da gepatroj, tiom da infanoj amantaj lin ?

Ĉar ankaŭ soldatoj ni estas ! Soldatoj en la porpaco armeo, kiuj, ne kiel soldatoj sur la bataalkampo en unu fojo donas sian vivon - ,oferas ĉiutage eron de sia vivo por la realiĝo de sama celo. Ĉar la flamo sur tiu tomo staras en la signo de la eterna " REMEMORU ", kaj nur la heliga lumo de la pacoflamo, ardanta en nia interno, povas paliĝigi tiun ĉion detruantan flamon de la malamo !

Ni iru do tien kaj ni promesu solene nur ripozi tiam, kiam de sur la tomo de la malamo, novan homaron surlumos la eterna flamo de la pacamo de homo al homo, de popolo al popolo !

A. POSENER



La unua poŝtmarko el la mondo kun Esperanta teksto eldonita de SOVJET-UNUIĜO

La unua oficiala poŝtmarko el la mondo kun Esperanta teksto estas eldonita kaj servas nun por ĉiuj forsendaĵoj de Sovjet-Unuiĝo al ĉiuj partoj de la mondo. Ĝi estas poŝtmarko da sep kopekoj, jubilea marko, kun la bildo de Popov, kiu organizis la radiotelegrafon en Rusujo.

Dum la tutmonda kongreso de telegrafio en Paris la Sovjeta delegitaro de la poŝtadministracio enkondukis la proponon por diskuti proponon pri la uzado de internacia helplingvo kaj ke oni povos uzi Esperanton. Por montri ke la Sovjeta delegitaro efektive deziras realigi sian proponon la poŝtadministracio de la Sovje-

ta Unuiĝo uzis Esperanton por la nova jubilea marko. Estis eldonitaj 600.000 ekzemplerojn de ĝi kaj samtempe ankaŭ 500.000 poŝtkartoj kun Esperanta teksto.

La Sovjeta Unuiĝo tiamaniere fariĝis antaŭulo en tre grava kampo, ĉar temas pri la akceptado de Esperanto por internacia praktika uzado. Oni nur povas esperi ke la poŝtadministracioj de aliaj landoj sekvu la ekzemplon, kiun donis tiu de Sovjeta Unuiĝo. Ĉiuj esperantistoj en la mondo kun granda plezuro ekscios ke la oficiala poŝtmarko kun Esperanta teksto nun efektiviĝis. La rezultaton ni ŝuldas al la energia laboro de la Esperantistoj de la poŝt, telegraf kaj telefonadministracio de Rusujo. Estas ja tre multaj esperantistoj en tiu ĉi administracio. Ĝiuj grupiĝis en unuiĝo kun faka gazeto Svjasi, kiu ankaŭ publikigas artikolojn en Esperanto.

EINAR ADAMSON

(Svenska Arbetar Esperantisten)

(El Sveda lingvo tradukis J. Jacobs)



Esperanto, oficiala lingvo

La internacia konferenco de la Ŝtatoj kiuj estaj anoj de la Universala Telegrafa Unuiĝo, ĵus rekonis oficiale Esperanton, laŭ la rekomendo de la kvina kunsido de la Ligo de la Nacioj.

La artikolo 7 de la internacia telegrafa regularo permesis la uzadon de la naciaj kaj latina lingvoj. Oni kompletigis la lastan paragrafon kiel sekvas : La uzado de la latina kaj esperanta lingvoj estas ankaŭ permesata.

La franca delegitaro ageme kunhelpis al la alprenado de tiu ŝanĝo, kiu donas al Esperanto ĝian oficialan definitivan rekonon kiel internacia helplingvo.

* * *

Saluto al la Hejmo !

Al la hejmo mi sopiras ;
Al la kara hejmoland.
Kie dolĉe oni diras,
Kie gaje sonas kant ;
Kara hejmo, nur al vi,


ILUSTRITAJ POŝKARTOJ

* * *

Grandegan sekceson havas la ilustritaj poŝtkartoj eldonitaj de A.P.P.K. En unu monato estis venditaj 4250 da ili, instigata de tiu sukceso oni decidis eldoni duan serion. Tiu nova serio, jam estas preta.

La teksto sur la karto estas trilingva: Esperanta, flandra kaj franca kaj do ankaŭ uzebla de neesperantistoj. Haveblaj: Groote Beerstraat 7. Antwerpen kaj ĉe ĉiuj anoj de A.P.P.K.

La prezo de unu serio, da 10 ilustritaj poŝtkartoj, lukse presitaj sur bela kartono, estas 1 fr. b. krom sendelspezoj.



NOVA LERNLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernlibron ilustritan: COURS PRATIQUE D'ESPERANTO eldonita de Librairie centrale espérantiste, Paris, (192 paĝoj.) — Prezo: 6,50 fr. krom sendokostoj.

Ĝenerala deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotterdamstraat 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

* * *

MIGRANTAJ KARTOJ A. P. P. K.

Uzu la plej praktikan migrantkartojn. Antaŭmilita prezo: 10 por 1 fr. krom sendokostoj.

Por ĉiuspecaj PRESAĴOJ

adresu vin al la

PRESEJO „ ESPERO ”

LANGE VAN RUIJSBROECSTR. 36. ANTWERPEN

SPRITAĴO

* * *

— Nu, kiel fartas via patro ?

— Mia patro ? Ĉu vi de forgesis ke li mortis la pasintan jaron ?

— Ho, jes, vi estas prava ! Mi ne intencis demandi pri tio ; mi nur deziris scii ĉu li estas ankoraŭ ĉiam morta.



KIE RENKONTIĜAS LA ANTVERPENAJ ESPERANTISTOJ ?

A. P. P. K. Jaŭde, je la 8^a en Centraal Schouwburg; Van Wezenbekerstraat, 10. Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj — La 1^a mardon de la monato, je la 8^a, 66-68 Plantijnlei.

Antverpena Polica Grupo Esperantista — en Policiernejo, Gildkamerstraat, 9.

Suda Lumo — Vidu A.P.P.K.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj — Vidu A.P.P.K.

Nia Ideo kunvenas la 2^a dimanĉon de ĉiu monato je la 9^a matene en « Volksgebouw ».

* * *

RICEVITAJ.

Revuoj.

* * *

Arbeider Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Göteborg, Svedujo. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — Il Cantastorie-Catania, Italujo. — El Heraldo Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Holanda Esperantisto. Eemnes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Informoj de Esperanto-Asocio. Tallinn, Estonio. — La Interligilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Libera Laboristo. Paris, Francujo. — Liberpensulo, Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid, Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelo. Kaŭnas, Litovujo. Amerika Esperantisto Boston-Usono- La Semisto. Sabadell, Hispanujo. — Suda Kruco, Melbourne, Aŭstralio. — La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo. — Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

* * *

Libroj, katalogoj, flugfolioj, k.t.p.

Ĉiuj menciitaj revuoj, libroj, katalogoj, k. t. p. estas je la dispono de niaj membroj.

* * *

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
E
PERSPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSSTRAAT 51

1^A JARO

N^o 12

DECEMBRO 1925

Jara Abono
Unu Numero

Belgujo 2,50 Bfr.
" 0,25 Bfr.

Eksterlando: 4. — Bfr.
" 0,40 Bfr.

Sonoriloj plendantaj

Kristnasko

La sonoriloj, plendantaj per basaj tonoj pro la morto, kies tintado, kiel tiom multe da anĝelvoĉoj, akompanas la novedziĝontojn al la altaro, nun aŭdigas siajn solenajn tonojn super urboj kaj vilaĝoj, super montoj kaj nekampoj, anoncante la naskiĝon de l' Mesio!

Kristnasko! naskiĝotago lumis de l' Savinto!....

En humila kabano, super kiu lumis brilanta stelo, lia gvidstelo, naskiĝis hodiaŭ la Homo kiu oferis sian plej altan havaĵon, sian sangon, sian vivon por realigo de sia misio, por alporti la pacon al la Homaro.

Kristnasko!.... paco sur tero!

Preskaŭ dumilfoje jam la sonoriloj ĉiujare vekas ĉe la homoj la rememoron al la Pacalportanto. Tiomfoje la homoj endormulus sian konsciencon ne atentante tion, kio ĉirkaŭas ilin.

Paco sur tero!..... kiam homoj mortas

pro malsato dume aliaj vivas superplensate. Paco sur tero!..... kiam homoj loĝas en palacoj dume kunvivantuloj nur havas la malmolajn stratpavimojn por ripozigi dumnokte sian lacan kapon. Paco sur tero!.... kiam tie malproksime blankoj kaj koloruloj intermortigas sin, kiam eĉ en la plej malgranda loko la homoj ne interkonsentas.

Kaj la sonoriloj movigantaj per homaj manoj, laŭte sonorigas tamen:,, paco, paco....daŭra paco sur tero!,,

* * *

En la griza malproksimeco, per nebuloj ĉirkaŭita, io ekvidebliĝas. Kio estas? Lacege ĝi almarŝacas laŭ la kruda mondvojo, kie ne unu loketo eĉ la plej malgranda, invitas ĝin al ripozo. Kio estas? Kvankam ĝi ŝajnas faleti oftfoje, ĝi tamen kuraĝe paŝon post paŝo antaŭeniras: Kio estas?

Tio, kion anoncas la sonoriloj!...
La paco!...

Kaj dume la paco - kiel la senhavulo estas forpelata de lando al lando, mi gradas de loko al loko, la sonoriloj


aŭdigas sian porpacan laŭdkanton.

Sed ili mensogas! De la grandaj katedralsonoriloj ĝis la malgrandaj vilaĝpreĝejoj ili devige mensogas.

Forigu la homajn manojn kaj ili ne silentos. La senanimaj bronzaj korpoj tiam ekviviĝos kaj la malĝojo triligos ilin, kiel nur koro povas vibri en suferanta homa korpo. Nun ne plu ili aŭdigos ĝojsonojn, sed tiam la sonoriloj kantos elegion, plendante kaj plorante pri la Homoj, kiuj ne valoras la dolorojn kaj la sangon verŝitan de la Savinto.

La sonoriloj tiam plendas.

A. Posener



LA DEK ESPERANTISTAJ LEGĜOJ

1. Esperantan societon, kiel membro tuj eniru,
Tie ĉiam sen haltado, kaj ageme vi aboru.
2. Nian nomon vi defendu, kaj fermigu nur la buŝo
De l' mokantoj kaj ridantoj: for do ĉiu intriganto!
3. Ĉiutage vi parolu, kelkaj horoj jam sufiĉas,
Nian belan karan lingvon, kiun ĉiuj tiam ŝatas.
4. Tre kuraĝe vi klopodu, la senĉesan disvastigon
De l'afero ne forgesu, nek ĵurnalan propagandon.
5. Abonante revueton, vi jam estas laboranto
De verkistoj senlacigaj, kaj de l' kaŭzo protektanto.
6. Sur la vesto ĉiam montru verdan stelon, tre videble,
Ĉe promeno kaj vojaĝo ĝi valoras nekredeble.
7. Pro la nomo vi ne hontu, sed fiere kapon levu!
Nia lingvo, tra la mondo, post la venko certa flugu!
8. Kiel fratoj vin amantaj. pace vivu kaj kontente,
Per konsilo kaj agado vin kunhelpu tre volonte.
9. Esperantan eliksiron en kafejo ĉie trinku,


El la verdaj cigaredaj, helan fumon vi elblovu!

10. Ĉiam gaja kaj kontanta, ĝis l'alveno de la morto.

Pri la sano tre feliĉa, vi batalos par l'afero

Antverpeno, Aŭgusto 1906.

D^o Wilfr. Broeckeaert.



Esperanto en la urbaj vesperlernejoj

Per decido de la urba skabenaro de la 13^{an} de novembro fraŭlino B. Geers, profesoro en la urba kvaragrada lernejo por knabinoj n^o 1, kaj sinjoro Broekhoeve, instruisto en la urba elementa lernejo por knaboj n^o 19, ricevis la oficon de profesoro pri Esperanto en la oficialaj urbaj vesperlernejoj kun jara salajro da 1500 fr. b.

Al ambaŭ samideanoj A.P.P.K. sendas siajn plej sincerajn gratulojn esperante kaj lia laborado donu fruktoriecan rikolton.

En la nuna momento funkcias en Antwerpen kvar oficialaj vesper kursoj pri Esperanto, gvidataj de profesiaj geinstruistoj. Tiun ĝojigan rezultaton oni nur ŝaldas al la nelacigebla klopodado de A.P.P.K., kiu per tio faris grandan paŝon en la direkto al la definitiva venko de Esperanto.

* * *

Gratuloj

A. P. P. K. sendas siajn plej sincerajn gratulojn al:

S^o Geers, polickomisario en nia urbo, patro de nia simpatia samideano B. Geers;
S^o L. Ritschie, ĝenerala direktoro de la urba personaro, kasisto de Antverpena Grupo Esperantista;

kiuj ambaŭ estis nomitaj Kavaliro en la Ordeno de la Krono;

S^o O. Van Schoor, prezidanto de Antverpena grupo Esperantista, fame konata folkloristo, kiu estis nomita ano de la Komitato de la urba Muzeo de Folkloro;
Sroj H. Michiels kaj A. Roose, anoj de la Anverpena Grupo de Esperant istaj

Geinstruistoj, kiuj okiris la diplomon de stata lernejinspektoro. Ni estas certaj ke tiuj ĉi fervoraj samideanoj certe uzos en sia nova ofico sian gravan influon por akceli la enkondukon de Esperanto en la lernejoj.n

A.P.P.K.

Nekrologio

Ni plenumas la malĝojan devon sciigi al la samideanaro la dolorigan novaĵon pri la morto de S^{ro} H. Michiels-Duquenne edzino de nia simpatia samideano, s^{ro} H. Michiels la unua oficiala profesoro pri Esperanto en Antwerpen. Multe simpatianta kun la Esperanta movado ŝi akompanis sian edzon al la nacia belga kongreso en S^t Niklaas kaj al la internacia antaŭkongreso en Lübeck (1922). Al la funebranta samideano ni sendas la esprimon de nia sincera kondolenco.

A.P.P.K.

* * *

Nekrologio (SEKVO)

Kun granda doloro ni sciigas la tro fruan morton de S^{ro} Ben Kok, la desegniston de la titolo de nia Bulteno. Kvankam neesperantisto li estis tre favora al nia movado. Ni prezentas nian sinceran kondolencan al la funebranta familio.

Grava Alvoko

Ni insiste petas la abonanton de nia "Bulteno", sendi senprokaste la abonpagon por la jaro 1926 (2,50 fr. por Belgujo; - 5 fr. por eksterlando) al la administranto, S^{ro} J. Swalf, August Sniedersstraat; 51, Antwerpen.

Ni profitas de la okazo por peti la grupojn aliĝintajn al A.P.P.K. kaj al la subtenantaj membroj sendi kiel eble plej baldaŭ sian kotizaĵon por 1926 al la kasisto de A.P.P.K. adreso ĉi supre

Iĝu membro de

U. E. A.

Juna Filozofa

El la flandra lingvo de "Hekelaar",

Nia matenotasko finiĝis. Kiel areto da paseroj niaj redakcianoj disfluegis por serĉi tagmanĝon. Estas hodiaŭ vera somervetero. Ĉarma aŭtunsuneto sendas siaj varmajn radiojn sur la kokinplumoj, legomrestaĵoj, pecoj da potoj kaj aliaj stratmalpuraĵoj, kiujn mi vidas ĉiutage en la ĉefstrato de la Antverpena Ghetto (juda kvartalo) En la mezo de la strato, apud malpurajamaso, staras du knabetoj gestantaj. Kion ili diras, mi ne aŭdas; sed estas klare videble, ke ambaŭ ne interkonsentas. La pli granda el ambaŭ estas ŝovinta sian longsirmilitan ĉapon sur la dekstran oreton. Liaj manoj penas vidiĝi el la tro longaj manikoj. Lia pantalono estas tro longa por esti mallonga kaj reciproke tro mallonga por esti longa pantalono. Liaj vestaĵoj estas faritaj por daŭraj kreskuloj. Lia kamaradeto estas nigra buklulo, kiu certe ĝumanĝis gelatitan pantranĉon, ĉar lia buŝo estas tute ĉirkaŭita per tio dolĉaĵo. Li portas maristkostumon, kiu estis koninta pli bonajn tagojn, al kiu ankoraŭ paradas almenaŭ unu kupra butono. Ambaŭ estas veraj, malfalsaj stratbuboj. Kiam mi alproksimiĝas, mi aŭdis ilin disputi. "Gelatbuŝeto, ekpuŝas sian kontraŭulon, devigante tiun-ĉi malantaŭeniri." "Crandjakulo, ŝvingas unue sian dekstran brakon en la aero kaj falbruigas ĝin sur Gelatbuŝeton. Tiu, ĉi eksancelas kaj falas, trans la malpurajamaso teren. Longjakulo rigardas ĉirkaŭen kaj antaŭ ol Gelatbuŝeto ekstaras li tuj forkuregas. Tion ekvidas Gelatbuŝeto. Pro kolero li piedfrapas la terurajn teronsenĉese, kvazaŭ li havas dolorojn. Maljuna virineto volas konsoli lin.

Venu nur kun mi, knabo, ŝi instigas.

Ne, krias Gelatbuŝeto, kaj ploras kaj piedfrapas daŭre.

Ĉu li tiel dolorigas vin, knabo?

Ne! Ne!

Kial do, vi tiel ploras.

Ĉar li forkuras, plorĝemas Gelatbuŝeto per longson voĉo/

Tiam la virineto kunlogis tamen la knabeton, kiu ensorbis dolĉajn larmojn ĉar ili fluis laŭlonge la gelatrezervo al lia buŝo.

Tiel estas ankaŭ en la vivo. Esti atakata

estas nenio : ricevi batojn ankaŭ ne. Sed ne povi defendi vin kontraŭ tiu, kiu atakas vin, tio vin fu riezigas, tio dolorigas pli ol la batoj mem.

Kaj pro tio, Gelatbuŝeto pravis kolerigi tiel multe pro la forkurado de Longjakulo. Kun afabla permeso de l'aŭtoro tradukis.

A. Posener.




Nova Grupo

* * *

Kun plezuro ni ekscias ke nova neŭtrala grupo esperantista "La Rekta vojo", starigis en nia urbo la 22^{na} de novembro. Ĉi jam aliĝis al A.P.P.K. La prezidanto estas s^{ro} J. Karnas; la sekretario F^{ino} B. Geers; kasisto s^{ro} Lodema. La grupo regule kunvenas en Hôtel Cecil, Van Arteveldestr. 8, sabate je la oka.

Ni deziris al la nova grupo daŭran prosperadon.



Informoj

La "Rekte Vojo" organizos inaŭguran balon la 16^{na} de januaro 1926, en la salono "Van Wesenbeke" Van wesenbekestraat, 11. Por tiu okazo oni varbis plej faman "Jass-bandon". Ĉiuj esperantistoj estas invitataj.

* * *



Grava Informo

Pro plialtiĝo de preskostoj la abonprezo de la "Bulteno" estos komence de la 1^o de januaro 1926, 6 frb. por la aksterlando.

* * *

Iĝu ano de
U. E. A.

KIE RENKONTIĜAS LA ANTVERPENAJ ESPERANTISTOJ ?

A. P. P. K. Jaŭde, je la 8^a en Centraal Schouwburg, Van Wezenbekestraat, 10. **Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj** — La 1^{ma} mardon de la monato, je la 8^a, 66-68 Plantijnlei.

Antverpena Polica Grupo Esperantista — en Policiernejo, Gildekamerstraat, 9.

Suda Lumo — Vidu A.P.P.K.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj — Vidu A.P.P.K.

Nia Ideo kunvenas la 2^{na} dimanĉon de ĉiu monato je la 9^a matene en « Volksgedebouw ».

La rekta Vojo Sabate, je la 8^a en Hotel Cecil, Van Arteveldestr, 8

* * *

RICEVITAJ.

—
Revuoj.

* * *

Arbeider Esperantisten. (La laborista Esperantisto.) Oslo, Norvegujo. — Arbetar Esperantisten. (La laborista Esperantisto. Göteborg, Svedujo. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro, Brazilujo. — Bulgara Esperantisto. Sofio, Bulgarujo. — Il Cantastorie-Catania, Italujo. — El Heraldo Naturista. Mexico, D. F. Mexico. — Holanda Esperantisto. Eemnes, Nederlando. — Homeco. Popov, Bulgarujo. — Hungara Esperantisto. Budapest, Hungarujo. — Informoj de Esperanto-Asocio. Tallinn, Estonio. — La Interjigilo de l' P. T. T., Paris, Francujo. — International Language. London, Anglujo. — Libera Laboristo. Paris, Francujo. — Liberpensulo, Leipzig, Germanujo. — Licht en Waarheid, Antwerpen, Belgujo. — Litova Stelo. Kaŭnas, Litovujo. Amerika Esperantisto Boston-Usono- La Semisto. Sabadell, Hispanujo. — Suda Kruco, Melbourne, Aŭstralio. — La Unuigita Tuthomaro. Hamburg, Germanujo. — Vegetarano. Hamburg, Germanujo.

* * *

Libroj, katalogoj, flugfolioj, k.t.p.

Ĉiuj menciitaj revuoj, libroj, katalogoj, k. t. p. estas je la dispono de niaj membroj.

* * *